



NORDHUNGARIA INFORMO

*Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc*

Majo - Junio 2010-a

Enhavo

Je la 2010-a, ensalutis la Jaro de Tigro	3
Ankoraŭ antaŭ majo okazis	3
Forpasis la eksprezidanto de ILEI	4
Ekspozicio en la Tutlanda Fremdlingva Biblioteko en Budapeŝto	4
je memoro de d-ro Ferenc Jáki	4
Jubileoj	8
100 jariĝa festo de la Oradea Esperanto-Asocio	9
En Oradea la 7-9-an de majo 2010 la rumanujaj kaj hungarujaj geesperantistoj festis kune la	
100. jaran datrevenon de Esperanto-Asocio de Oradea	14
Niaepoka esperantista verkisto en Rumanio	18
Kia estis	19
JAPANESKE	20
PROLOGO	21
Katastrof-atakita teritorio estas Norda-Hungarujo	24
Apud la rivero Sajó	25
Kölcsey: Himno	26
Niaepoka verkisto de Norda Hungarujo	26
Libro prezentado - Muzeoandragio	27
Ĉu vi scias, ke	27
Ni funebras	28
Muzeo „Herman Ottó” de Miskolc	29
Aforismoj	31
El nia leterkesto	31
Germanio - Herzberg	32
Francio: Lyon – Hungario: Tiszafüred	34
Hungario – Miskolc – Observatorio	35
Hanojo, urbo kun miljara bela kultura tradicio	35
Hungarlandaj Ekskursoj	36
Historio de Tiszaszederkény (Tisasederkenj)	38
Fortikaĵo de vilaĝo Ónod, laŭ la hungara Vikipedio	40
Ŝercoj	41
La jaro 2010, estas ankaŭ Jaro de la Biodiverseco	41
Sekso de la muŝo	41
Esperantistaj Aranĝaĵoj 2010	42
Amika Renkonto de Fervojistaj Geesperantistoj – Pécs 2010	43
Pliaj informoj	44
La jaro 2010a estas ankaŭ la Jaro de numero 3	44
Nova Memortago en Hungario	45
Elstara figuro de nia altetaksata pasinto estas Ferenc Kölcsey/ 1790-1838/	45
Himno / 1823 /	47
Hust / 1831 /	47
Hust	47
La publika aganto	47

Je la 2010-a, ensalutis la Jaro de Tigro



Tigrobildo el la Hungara Vikipedio

Laŭ la ĉina horoskopo la Jaron de Tigro karakterizas krom la dramaj vivturniĝoj, ke la homon povos atingi tre duraj defioj. La naskitojn de la Jaro de Tigro karakterizas la memfido, la energio kaj la forto. Sed kiom ajn da **bono** promesas la horoskopo por tiuj homoj, oni ne povas lasi senatente, ke nur tiuj homoj iĝos sukcesaj, kaj vekos estimon, kiuj tre serioze laboros por atingi ilin.

/Laŭ tekstoj de la hungara Vikipedio kompilis Adri sinjorino Pásztor/

Ankoraŭ antaŭ majo okazis

Jen kelkaj informoj pri la "Kalva monto Eyja meze de glacikampo" (Eyjafjallajökull)

KIO, KIE, KIA, KIAM

Unu el la mezgrandaj vulkanoj de Izlando, je 5 km de la suda marbordo. La geografiaj koordinatoj estas 63gradoj -38' N -- 19 gradoj 36' Ok

Ĝi apartenas al la rifto (meza valo) de la Mezatlantika dorsaĵo evoluanta inter la Amerikaj la Eurazia terkrustaj platoj, kiuj moviĝas for unu de la alia 1.2 cm po jaro. La vulkano estas 1.666 m alta, ĝia teritorio 100 kvadrataj kilometroj: La diametro de la kratero estas 5 km. Eyja estas stratovulkano konsistanta el alternantaj tavoloj de lafo kaj piroklastaĵoj, tio estas vulkana polvo (**ne** cindro = ash = hamu, ĉar nenio estas brulita) kaj lapilio (rokfragmentetoj diametre kiel sableroj). La konsisto estas bazalta.

Estas konate, ke Eyja erupcii eksplode en la jaroj 920, 1612 kaj 1821 p.K.Ĉi-lasta aktivado daŭris ok monatojn. Sekvis ĝin subglacia eksplodo de la proksima vulkano Katla.(Tiu ankaŭ nun troviĝas en nestabila stato laŭ la kompetentaj geofizikistoj.)

FREŜAJ EVENTOJ -- gravas la direkto de la ventoj.

En decembro 2009 sismologoj konstatis tertremetojn en la regiono. Magnitudo: 1-3 laŭ la 10-grada skalo de Richter. La 26-an de februaro 2010 la Meteorologia Instituto raportis pri pli forta tertremo. Ekde la 3-a de marto la sismoj iĝis pri oftaj kaj pli fortaj. **La sismologoj signalis la eblecon de baldaŭa erupcio** .

La 20-an de marto 2010 okazis la unua erupcio: tra flanko fendego, 8 km oriente de la kratero.(Ne sub glacio!). Tio daŭris pli ol semajnon.

La 14-an de aprilo 2010 okazis dudekoble pli intensa, eksploda erupcio, ĉifoje en la centro de la kratero. Sekvis fluego de glacia akvo. 800 homoj estis fortransportitaj ĝustatempe. La silikata materialo, ĉefe polvo, estis ĵetita alten ĝis 10 km. La reganta vento estas nordokcidenta, do la polvonubo moviĝis sudorienten, direkte al suda Skandinavio.La ĉefurbo de Izlando, Reykjavik , situas okcidente de la vulkano Eyja, do la polvonubo ne tuŝis ĝin.

La 15-an komenciĝis teknikaj problemoj en la eŭropa aertrafiko

Krom la kristaleca aŭ vitreca "polvo"-materialo ankaŭ *grandega amaso da karbondioksido* estas eligata. (Atenton, verduloj!)

Saluton glaci-varmegan: Endre Dudich geologo

- Forpasoj -

Forpasis la pola ŝtatestro Lech Kaczyński kaj sia akompano

Pro nebulo kraŝis la aviadilo de la pola ŝtatestro vojaĝante kun sia akompano por estimdoni okaze de la 70. jardatreveno de la amasbuĉo en la ruslanda Katyn. La tragedio skuis la tutan mondon. Ni eklumigis kandelon je memoro de la publikvivaj homoj kaj sendis mesaĝojn pri nia kondolenco al niaj polaj esperantistaj geamikoj.

Adrienne sinjorino Pásztor

Forpasis la eksprezidanto de ILEI

Profesoro Maŭro La Torre (1946-2010), leganto de nia retrevuo Nordhungaria Informo, eksprezidanto de ILEI, forpasis la 25-an de marto 2010-a, en Romo, Italio. Ni malgaje kondolencas al la familianoj kaj al liaj gesamideanoj. Nia movado pli malriĉa estos sen li. Esperanto Amika Rondo „Király Lajos” de urbo Miskolc.



Ekspozicio en la Tutlanda Fremdlingva Biblioteko en Budapeŝto je memoro de d-ro Ferenc Jáki

Je memoro de la kara sinjoro instruisto, poeto kaj arta tradukisto, mi aranĝis ekspozicion el lia verkaro, trovebla en nia biblioteko. Mi estis vere kortuŝita, pro ties multe da vizitantoj kiuj interesiĝis pri tio. Bonvolu rigardi miajn fotojn pri iu parto de la de mi farita ekspozicio.

En stoko de nia biblioteko kaj en la Kolektaĵo-Fajszki troviĝas liaj jenaj verkoj:

1, Gesztenyevirágok őszi verőfényben / Poemoj de Ferenc Jáki – 111779; E 6859

(Kaŝtanfloroj en aŭtuna sunbrilo)

2, Poemoj kaj artaj-tradukoj de D-ro Ferenc Jáki – 111776; E 6855

3, Fecskefészek; Csillagszóró / Poemoj de Ferenc Jáki – 111780

(Hirundanesto, Stel-dispersilo)

4, Kódex versek (Kodeksaj poemoj) – 111781

5, Kantante vivi = Énekelve élni; Poemoj kaj artaj tradukoj – 111777

6, Hungaraj Popolkantoj en Esperanto – E 2170

7, Ekzercaj taskoj por la lingvoekzamen o – E 20579

8, Világiroaldom – Világnyelv (Mondliteraturo-Mondlingvo)

/Aparta represo el revuo Kortárs 1968; Nro 11, / E 678

9, Füles Évkönyv 1976. Tanuljon Esperantóul! Nyelvtanfolyam dióhéjban /Jáki Ferenc p. 174-179.(Jarlibro 1976a)

10, Füles Évkönyv 1984; Holt nyelv-e a latin? 106-111, E 5415


(Jarlibro 1984a, surhavas bildon de azenido: Ĉu mortinta lingvo estas la latina?)

12, Füles Évkönyv 1984; Holt nyelv-e az ó-görög? p. 122-128, E 5416

(Jarlibro 1984a, surhavas bildon de azenido: Ĉu mortinta lingvo estas la malnov-greka?)

13, Füles Évkönyv 1983, Mini tanfolyam p 211-215 E 5417.

(Jarlibro surhavanta la bildon de azenido: Eta lingvokurso)



/Pri la memora - libroekspozicio la informojn de la bibliotekistino Anna Marosvölgyi, esperantigis s-ino Adrienne Pásztor/

Nun bonvolu rigardi la bildojn fotitajn de sinjoro László Pásztor, okaze de la diservo dum adiaŭo de sinjoro d-ro Ferenc Jáki. Liajn cindrojn la familianoj ŝutis en la Danubon, sen partopreno de la adiaŭantoj.



De parto de la hungaraj geesperantistoj la funebran adiaŭon diris sinjoro Imre Szabó
prezidanto de HEA





La bildoj montras la funebrantojn, kaj florojn de la rememoro. Fotis: László Pásztor



La romkatolika preĝejo en Erd

Jubileoj

2010 estas la 20. jariĝo de “**Esperanto en Azio**”, bulteno de Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado (KAEM).

2010. estas jaro de 100 jariĝo de la Esperanto-movado en Italio

La ĉeesto de Esperanto en Italio, komenciĝanta 3 jarojn post la apero de la Unua libro, balanciĝis dum la jardekoj inter gravaj rekonaj kaj pezaj baroj, sukcesinte tamen travivi la periodon de la faŝisma diktaturo kaj donante gravajn kontribuojn al la internacia E-movado kaj kulturo .

100-jara Esperanto-jubileo en la Esperanto-urbo Herzberg

Antaŭ 100-jaroj, la 10-an de marto en 1910, aperis gazetartikolo en la regiona gazeto Kreis-Zeitung, kiu alvokis al fondo de Esperanto-kluboj en la Suda Harz-montaro kaj anoncas kunvenon en Herzberg am Harz! La artikolo, kiu estis retrovita en la urba arkivejo, mencias ankaŭ la nomojn de konataj lokuloj. La 25-an de marto 2010 pro tio okazis festvespero en la urbodomo kun la ĉeesto de urbestro Gerhard Walter, lokaj politikistoj, reprezentantoj de Interkultura Centro Herzberg kaj s-ro Baitz, kies avo, s-ro Felix Baitz (vidu foton), estis unu el la fruaj Esperantistoj en Herzberg am Harz. Dum la vespero s-ro Baitz parolis pri sia avo, Peter Zilvar resumis la historion de Esperanto kaj parolis pri Esperanto-agado en Herzberg. El la retejo <http://esperanto-urbo.de>

El la Informilo de Ĝemelaj Urboj / 9-a jaro N-ro 1 (32) aprilo 2010//

Okaze de tiuj ĉi gravaj okazintaĵoj, pliajn sukcesojn deziras al ilia agado:
Esperanto Amika Rondo „Király Lajos” de urbo Miskolc

100 jariĝa festo de la Oradea Esperanto-Asocio



/Blazono de Nagyvárad el la Hungara Vikipedio./

Oni menciadas la urbon proksime situantan al la hungara landlimo, kiel Varad /latine: Magnowaradinum/. Ĝi ĉirkaŭsituas la bordojn de rivero Ŝebes -Kőrös (rumane Rapid-Kriŝ) kaj etendiĝas ĝis montetoj de Várad . La landlimstacio sur la ŝoseo estas vilaĝo Bors/Borŝ/, inter la du setlejoj estas dek kilometroj. Ni atingas unue per trajno la setlejon Biharpüspöki / Episkopeco de Bihar/. Inter Budapeŝto kaj Nagyvárad (Oradea) estas 250 km-oj, inter Oradea kaj Kolozsvár (Cluj) estas 152 km-oj. La plej proksima hungaruja grandurbo estas Debrecen, kien multe da homoj iras por labori kaj lerni. Nagyvárad (Oradea) estas la sidejo de la departemento Bihar. Tiu estas la plej granda urbo de la regiono, kiu – laŭ niaj babiladpartneroj – havas ĉ. 300 mil loĝantojn, el inter tiuj ĉ. 100 mil havas la hungaran kiel gepatran lingvon . Kvankam laŭ la statistikoj nur pli malmulte da homoj deklaras sin hungaroj.

Ni vidis dum niaj urborigardaj promenoj laŭ araba modo vestitajn virinojn, kiuj povis esti la en urbo lernantaj gejunuloj aŭ iliaj parencoj. Iam terfortikaĵo staris sur ĉi tiu teritorio. Reĝo László, la 1-a, la Sankta, (Ladislao I-a) fondis monaĥejon sur loko de la nuna fortikaĵo inter jaro 1083 kaj 1095. Laŭ la tradicio **reĝo László 1-a, la Sankta**, konstruigis la ankaŭ nun starantan fortikaĵon ĉirkaŭ la monaĥejon, samloke de la iama malnova terfortikaĵo: por defendi la monaĥejon, la ĉi tieajn komercajn vojojn kaj la setlejon. Pro tio reĝo László 1-a lokigis ĉi tien la episkopecon de departemento Bihar. Oni entombigis la reĝon en la urbo en 1095, lia tombo estas pilgrimejo ekde 1192. En 1241. la tataroj sieĝis la fortikaĵon, okupis la setlejon kaj detruis ankaŭ la fortikaĵon. Rogerius, episkopo devenanta el Spalato /Kroatio/, eklezia distriktestro priskribis en sia verko „Plorinda kanto”, ke la tataroj mortigis grandparton de la loĝantaro de la urbo kaj ili kuntrenis multe da homoj kiel sklavojn. / Urboparto portas la nomon de Rogerius/. Rajdostatuo de reĝo László 1-a, pretiĝis en 1390, sed post „Pakto de Trianon”(1920) la romanoj forigis ĝin kaj anstataŭ ĝi oni starigis tien la rajdostatuon de la landonunuiganta rumana reĝo II. Ferdinand..En Nagyvárad (nun Oradea) funkciis inter 1445 kaj 1465 Janus Pannonius kiel kanoniko kaj Johano Vitéz kiel episkopo. Armeo de Ali, bejo de Szendrő /Sendrő/ prirabis la urbon, sed la fortikaĵon li ne povis okupi. Poste oni fortigis la fortikaĵ-staton. Tiu ĉi urbo situanta laŭ la komercaj vojoj denove prosperis tempe de familio Hunyadi. En 1514 post subpremo de la kamparanribelo, iun korpopton de ĝia estro Georgo Dózsa (Doĵa) ekzekutita en Temesvár (nun Timiŝoara) oni pendigis, ankaŭ sur pordegon de Várad , ke ĝi iĝu fortimiga ekzemplo.





Bordo de rivero Rapida Kriș



Urbo partoj de Oradea



La sekva bildo montras fortikaĵon de Nagyvárad – nuntempe Oradea:



En 1598, la turka armeo denove sieĝis, sed tamen nur en 1660 okupis la turkoj la fortikaĵon. Nur en 1692 liberiĝis la fortikaĵo. La sieĝoj ĉiam pli kaj pli malfortigis la murojn de la fortikaĵo. Sed la fortikaĵo ankaŭ nuntempe staras, sed suferante la nerenovigon ĝi estas en tre kaduka stato.

La nova katedralo de la urbo konstruiĝis inter 1752 kaj 1779.

En dua duono de 16. jarcento la reformacio ekhavis multe da adeptoj inter la loĝantoj de la urbo. Kredantoj de la nova religio fondis ankaŭ altlernejon kaj libropresejon . Inter la urbo kaj la episkopeco estis ofte konflikto, pro tio la urbo malfacile evoluis. En unua duono de 19.

jarcento incendio estis en la urbo, kiu plumalbonigis staton de la urbo. La urbo havis denove gravan rolon fortiĝante dum tempo de la hungara revolucio kaj liberecbatalo de 1848-49, kiam la registaro restadis en urbo Debrecen. En dua duono de la 19. jarcento ekiris la industriiĝo, pro tio la industria laboristaro plimultigis la loĝantaron de la setlejo.

Nagyvárad (nun Oradea) estis - dum la jarcentŝanĝo de la 20. jarcento - unu el la plej signifaj centroj de la hungaria kultura vivo. La urbo altiris multe da verkistoj, poetoj. En la urbo vivis ankaŭ Endre Ady, poeto kaj ĵurnalisto, kiu aperigis siajn verkojn en Antologio „Holnap” /Morgaŭ/, kune kun inter aliaj Mikaelo Babits, Julio Juhász, Adalberto Balázs.

Grandskala evoluo de industrio de la urbo okazis post la dua mondmilito. Grandsignifaj estis la medikament- kaj kemiindustriaj fabrikoj. La maŝinfabriko funkcias ankaŭ nuntempe. En la Grandmezura estas la senlaboreco kaj la malriĉiĝo en Oradea kaj en ties ĉirkaŭaĵo.

Kvankam oni konstruis altajn blokdomojn sur remparon de la fortikaĵo, spite de tio la interesantoj povas trovi ĉi tiun elstaran historian scenejon de la hungara pasinto. Multe da eminentaj homoj naskiĝis aŭ vivis dum kelkaj jaroj en ĉi tiu antikva setlejo. Kelkiuj el inter ili kiel ekzemplo estu ĉi tie menciitaj:

- **Gabrielo Báthory/1589/** regnestro de Transilvanio
- **Sigismundo Báthory/1572/** regnestro de Transilvanio
- **Margareta Dayka/1907/** Aktorino, havas premion-Kossuth
- **Szabolcs Fényes/1912/** Komponisto, havas premion-Erkel Ferenc
- **Sinjorino Ödön Diósy/Adél Brüll/1872/** Muzo de Endre Ady
- **Petro Pázmány/1570/** Ĉefepiskopo de Esztergom
- **Gr. Ferenc Rhédey/1610/** regnestro de Transilvanio
- **Ede Szigligeti/1814/** Dramverkisto
- **Kolomano Tisza/1830/** Politikisto; prezidanto de Liberala Partio; ĉefministro 1875-1890.
- **Michael Haydn/1732-1806/** komponisto, frato de Joseph Haydn. Li komponis ĉi tie komence de la 1760-aj jaroj.

Imre (Emeriko) Szacsvey/1818-1849/, parlamenta notario. Li finis jurajn studojn ĉi tie. Li estis iu surskribanto de la sendependenca deklaro kiu estis datita la 13-an de aprilo 1849 kaj decidis detronigon de la Habsburg- Lotaringia dinastio. Oni nomis lin: „la plej fortkaraktera ano de la tiama hungara parlamento”. La aŭstra milita tribunalo ekzekutigis lin post malvenko de la revolucio. Li ripozas en Budapeŝto en tombejo de strato Fiumei. Pojare ĉirkaŭ lia statuo aranĝas la urba loĝantaro la feston memorante pri la 15-a de marto. 1848-a revolucio.

- **Karlo Jozefo Iréneus /6. marto 1854 -13. marto 1929/** fizikisto, instruisto, kanonoko de Premontre, inventisto de la sendrata telegrafo, unu el la plej eminentaj scienculoj de Nagyvárad, instruis matematikon kaj fizikon dum 33 jaroj en la Ĉefgimnazio de la ordeno Premontre.

- **Apollonia Kovács kantis kaj aktorin en Ŝtata Teatro de Nagyvárad inter 1949 kaj 1961.** Ŝi estas rekonata fama popolkantistino kaj aktorino ankaŭ en Hungario.

-**Julio Juhász/** instruis en la urbo inter 1908 kaj 1911. Oni inaŭguris je lia estimo memortabulon la 7-an de marto 1943 en la „Pázmány Péter” Ĉefgimnazio de la ordeno Premontre /nuntempe Mihai Eminescu Ĉefgimnazio./

Unu el la plej signifaj konstruaĵoj de la urbo estas la Palaco Nigra Aglo, kiu konstruiĝis inter 1907- 1909. Samloke de la palaco staris la Aglo-Gastejo, en kies ĉambrego oni aranĝis la unuan hungaran profesian teatran prezentadon la 26-an de aŭgusto 1798. Tiun gravan okazintaĵon eternigis ankaŭ memortabulo, kiun oni transmetis de muro de la iama Aglo-gastejo al la balkono de la Palaco Nigra Aglo. La memortabulo rigardis al la strato Kossuth. La memortabulo dum iu renovigo malaperis kaj ĝis nun oni ne retrovis ĝin. Teksto de la iama tabulo estas:

„Je memoro de la aŭdita unua hungara vorto de podio en ĉi tiu urbo, en ĉi tiu konstruaĵo la 26.an de aŭgusto 1798. – la 26an de aŭgusto 1898. Dankeman dankon de la posteularo, iniciate de Societo Szigligeti, publiko de urbo Nagyvárád.”

La Ŝtatan Teatron /kiu originale portis nomon de Ede Szigligeti/ oni konstruis en 1899-1900. Antaŭ ĝi staras busto de Ede Szigligeti kiu estas kreaĵo de skulptoartisto Ede Margo. (Same lia verko estas la statuo de Imre Szacs vay.) La buston oni starigis en 1912 antaŭ la teatron. La teatro komencis funkcii aŭtune de 1948 kiel Ŝtata Hungara Teatro de Nagyvárád. De 26-a de novembro 1955 ankaŭ rumana sekcio funkcias en la iama hungara teatro.

La Memormuzeo „Ady Endre” malfermiĝis en 1955, kies direktoro estis Cezaro /Géza/ Tabéry.

La belegaj barokaj kaj secesiaj konstruaĵoj igas la urbon neforgesebla.



Jen statuo de Emeriko (Imre) Szacs vay

En Oradea la 7-9-an de majo 2010 la rumanujaj kaj hungarujaj geesperantistoj festis kune la 100. jaran datrevenon de Esperanto-Asocio de Oradea

51 personoj partoprenis la festan simpozion, dum kiu okazis ankaŭ dokumentekspozicio. La ekspozicio estis aranĝite en la departementa biblioteko „Georhe Sincai” kaj la prelegoj okazis en etaĝaj konferencejoj de la „Lórántffy Suzanna” Reformata Kultura Centro. La ĉeforganizanto estis D-ro István Budaházy. Attila Makkay, prezidanto de la Esperanto-Societo malfermis la Esperanto-tagojn de Nagyvárád kaj salutis la ĉeestantojn nome de la urbo kaj la departementa biblioteko. Poste D-ro Stefano Budaházy kaj Suzana Barabás prezentis cent jarojn de la Esperanto-Societo de Oradea (Nagyvárád), poste sekvis rigardo de

la ekspozicio. Kolektaĵo de la esperantaĵoj estas grandvalora. Interkona vespero okazis dum komuna vespermanĝo.

La sekvan tagon denove estis prelegoj. Ni aŭskultis prelegojn de Irene Szűcs, Judita Oláh, Johano Csapó, Zita Filepp kaj Maria Budaházy. Poste s ekvis alparoloj alparoloj, salutante la ĉeestantojn: Ernesto Könczöl el Eger, Emeriko Cséti el Debrecen, Adri Pásztor el Miskolc, Aurora Bute el Temesvár. La simpozion fermis vortoj de Loránd Monosi. Antaŭ la festa komuna tagmanĝo sinjoro Attila Makkai per poeta patos prezentis: Mi estas esperantisto-titolan poemon de Julio Baghy hungaresperantista poeto. La bele deklamita poemo kaj sinjoro Attila Makkay rikoltis grandan sukceson. Inter la invititaj rumanaj gastoj de la aranĝaĵo estis inter aliaj ankaŭ: fraŭlino Bute rumania ĉefdelegitino de UEA, profesorino Marian Butan el Timișoara, docento Josif Nagy el Bukareŝto, prof-ro Doru Neagu el Slatina, gesinjoroj Crancau, gesinjoroj Scurt, Laszló Mária, Weis János, el Nagybánya, gesinjoroj d-ro Gabrielo Lázár el Kovászna, s-ino Stier Gabriella, el Szatmárnémeti ... Post tagmanĝo okazis urborigardo, dum tio estis esperantlingva fremdulgvidado kun ĉiĉeronado de: Johano Csapó kaj Antal Farkas. Dimanĉe denove estis urborigardo spite al l a pluvo. Alia grupo vizitis la termalakvan banejon „Felikso”. Ĉi tiuj programoj fermis niajn ekskursojn en Oradea (Nagyvárad). 9 geesperantistoj reprezentis Hungarujon el Debrecen, el Miskolc, el Eger kaj el Tokaj. La aranĝo estis bone organizita. La aktivuloj de la Societo prelegis kaj ĉiĉeronadis treege bone. Ni aŭdis, ke la ekspozicio estis malfermita ankoraŭ dum enu semajno, dume prelegoj estis pri la esperantlingva kulturo. La loka gazetaro vigle atentis la okazintaĵon kaj artikolojn aperigis pri tiu. El la urbo Pucioasa/DB, Mircea - emerito kaj radioamatoro, membro ILERA numero 475, radiomesaĝe salutis la ĉeestantojn okaze de la festo. Ni eksterlandaj gastoj ĝojis vidante la dokumentojn, ja tiuj montras multe da rememoroj el vivo de la klubo. Nun ni bedaŭras, ke oni portis dokumentojn de nia miŝkolca esperantista gvidanto, D-ro Ludoviko Gyóry Nagy al la kolektaĵo Fajsz, de tie al Söjtör prilaborcele sed ĝis nun ni ne konas la nunan staton, sorton de tiuj dokumentoj. Tiujn dokumentaĵojn ankaŭ ni bezonus, ĉar post 3 jaroj estos 100. jara la esperanto – movado en Miskolc. Tamen, ankaŭ ni ne devas honti nin, ĉar ankaŭ niaj dokumentoj bele plimultiĝas kaj ankaŭ ni povos montri multan valoran dokumenton por la rigardantoj de nia estonta ekspozicio.

Ni dankas la inviton kaj gastigadon al sinjoro prezidanto, Attila Makkay kaj al la geesperantistoj de Oradea. Ni dankas ankaŭ la kortuŝajn amikajn vortojn, gestojn. Edifa sento estis por ekkoni ilian urbon, por partopreni ilian jubilean feston kaj por saluti tiujn kun kiuj ni renkontiĝis tie.

Ni deziras al la oradeaj geesperantistoj pluajn sukcesojn. Ame:

Geedzoj Pásztor el Miskolc, ankaŭ nome de esperantistino de Tokaj, Margareta Juhász

Jen bildoj de la aranĝaĵo- fotis s-ro László Pásztor



D-ro Budaházy parolas



S-ro Monoši parolas, apude sidas s-ro AttilaMakkay



Dum la simpoziono



Memoraĵoj de la 100 jara Esperanto Klubo de Oradea



Nia loĝejo estis en ĉi gastodomo

Niaepoka esperantista verkisto en Rumanio

Karaj legantoj!

Ni nun prezentas al vi sinjoron Nagy E. Josif, kiun ni renkontis dum la Esperanto-festo de Oradeanoj. Lian aŭtobiografion vi povos legi malsupre:

„Mi estas **Jozefo E. Nagy**, doktoro pri kemia inĝenierado, docento ĉe la Politeknika Universitato de Bukureŝto, dufoje (sinsekve) edziĝinta, kun 1 + 2 plenaĝaj infanoj. Mi naskiĝis la 30-an de majo 1951 en Valea lui Mihai / Ĝermihályfalva, distrikto Bihor, Rumanio, urbeto kie mi ankaŭ abiturientiĝis en 1969. Mi akiris inĝenieran diplomon en la 1974-a ĉe la sama universitato, kie mi instruas jam ekde la 1980-a. Mi esperantistiĝis dum mia studenteco, en la studjaro 1970-1971-a, sekve de kurso gvidata de Adrian Boldan. Poste mi frekventis la Esperanto-Klubon de Bukureŝto, kie mi havis kiel mentorojn la elstarajn esperantistojn Árpád Simon, Aurel Boia kaj Constantin Dominte. Tradukojn el la rumana literaruro mi aperigis sporade en la esperanta gazetaro depost la 1978-a. Mi kunlaboris al la volumoj *Rumana Antologio* (1990) kaj *Eminescu en Esperanto* (2001 k. 2005). Miaj tradukoj aperis libroforme en la 2000-a (*La Vesperstel'* de Mihai Eminescu), en la 2001-a (*Mia antologio*) kaj 2004-a (*La Taglibro de Csoma Sándor* de Magyari Lajos), ĉiuj eldonitaj de mia amiko Ionel Oneț, mastro de la eldonejo BERO. Parto de miaj tradukoj el Esperanto en la hungaran legeblas en la hungara elektronika biblioteko, ĉe la retadreso www.mek.oszk.hu, sub la titolo *Eszperantó írók művei*.“

„ESTIMATAJ SAMIDEANOJ,
KARAJ AMIKOJ!

Rilate al la ĵus okazinta simpozio honore al la centjara datreveno de la Oradea Esperanto Societo, mi dezirus prezenti al vi la hungaran poeton Juhász Gyula (1883-1937). Ne nur, ĉar li vivis en Oradea inter 1908-1911, do ĝuste en la periodo de la organiziĝo de la Oradea esperantistaro; ne nur, ĉar malgraŭ tiu mallonga periodo lia nomo nedisigeble ligiĝis al la urbo, kie li renkontis la amon, kiu stampis lin por la tuta vivo; sed ĉar li estas unu el miaj plej ŝatataj poetoj, pri kiu mi almenaŭ dufoje dum mia vivo sentis, ke li skribis siajn poemojn por mi, anstataŭ mi.

Juhász Gyula kalkuliĝas, se ne inter la plej grandaj, almenaŭ inter la plej signifaj hungaraj poetoj de la dudeka jarcento. Li estis disĉiplo – sed ne imitanto – de Ady Endre, ties kunulo, amiko, kaj plej fidela heredanto kaj daŭriganto de la poetiko kaj mondkoncepto. Kaj li estis tiu, kiu plej frue rekonis la genion de József Attila, kiun li konsilis kaj apogis dum la fruaj jaroj.

Oradea estis nur unu etapo el la vagadoj de Juhász Gyula ĉirkaŭ Hungario, kiel ĉiam movigebla mezlerneja profesoro. Sed malgraŭ la mallonga tempo, li perfekte integriĝis en la vivon de la urbo, kiel profesoro, ĵurnalisto, teatra kritikisto, nokta vizitanto, kune kun la grupo de Ady Endre, de la drinkejoj kaj restoracioj. En la teatra medio li renkontis la amon de sia vivo, la facilmoran aktorinon Sárvári Anna. Tutcerte, ŝi ne estis digna je la amo kiun ŝi inspiris, amo kiu verŝajne neniam konsumiĝis. Sed malgraŭ tio, tiu amo inspiris eble la plej belajn am-poemojn de la hungara literaturo. Mi citos nur unu, en la genia traduko de Kalocsay Kálmán:

Kia estis...
(Milyen volt...)

*Kia estis ŝia blond, mi jam ne scias,
sed scias, ke l' kamparo estas blonda
se l' spikoriĉa or-somer' radias...
Mi ŝin resentas en ĉi oro onda.*

*Kaj ŝia okulblu'? Mi jam ne scias.
Sed se la bril' septembra de l' ĉielo
post nubokrev' adiaŭtriste strias,
reviĝas al mi ŝia okulhelo.*

*Kaj ŝia voĉo-silk'? Mi jam ne scias.
Sed en suspir' de l' kampo printempflora
la varma vok' de Anna melodias
el florsezon' pli-ol-ĉiele fora.*

Dum tiu tempo li estis ankaŭ arda kunlaboranto kaj promociiganto de la antologio *Holnap (Morgaŭo)*, vera mejloŝtono inter la moderna kaj konservativa hungara poezio, defendanto de ties modernigo. La signifon de ĉi tiu antologio evidentigas la fakto ke ofte Oradea estas nomata “la urbo de la *Morgaŭo*”. Eble la polemiko, kiu sekvis la aperon de ĉi tiu antologio puŝis lin al pli radikalaj, revoluciemaj sintenoj, kiuj kulminis per la aniĝo de Juhász Gyula al la idealoj de la revolucio de 1919. La forton de liaj konvinkoj demonstros la fakto, ke eĉ post la malvenko de la revolucio, li neniam malkonfesis ties idealojn. Sed lia voĉo ŝanĝiĝis. Ĝi mildiĝis, inter liaj temoj aperas pli ofte la nostalgio, la sopiro je la pasinta feliĉo, la sopiro je la morto, je la forpaso, je la forgeso. Unu el la plej belaj poemoj el ĉi tiu periodo estas “Japaneske”, kiun mi aŭdacas prezenti per mia propra traduko, publikigita antaŭ kelke da jaroj en la revuo Bazar:

JAPANESKE *(Japánosan)*

*Neniam havis mi konstru-inklinon,
Neniam logis min trezoro vanta,
Deziroj miaj loĝas la senfinon,
Kaj mia estas vi, printempo sankta.*

*

*En iuj noktoj luno, ortelero,
Proksimas tiel sur ĉiellazuro,
Kaj tiel malproksimas la sufero -
Ĝi flugis eble al ĉiela ĝuo.*

*

*En olda vino tiom da memoroj
Kaj tiom da forgeso vivas, ke jam ŝajnas
Al mi, kun paca ĝojo, ke l' doloroj
De mia viv' pasinta en ĝi fajnas.*

*

*Alsendis mia amatin' la keston, -
La nokte nigra, nigra kest' tuĉita -
En ĝi jazmenon velkan, la ateston
De mia velka vivo jam fuŝita.*

*

*Ĉasistoj povraj iun cervon ĉasis,
Pelitaj same de la vivospronoj.
La cervokuloj sangogutojn larmis,
Sed ĝi feliĉas pli jam, ol la homoj!*

Mi diris, ke Juhász Gyula vivis en Oradea dum la jaroj kiam organiziĝis la Oradea Esperanto - movado. Tamen, mi trovis nenian ateston, ke li estus lerninta Esperanton. Sed tute certe, li estis adepto de la ideo de la internacia lingvo, kion konfirmas lia poemo, verkita en la urbo Szeged, en 1919, kiun mi redonas same en la elstara traduko de Kalocsay:

PROLOGO

*por la programvespero
de la laboristoj-esperantistoj*

*Fratoj en kredo de futur' pli bona,
mi vin salutas kore en obskur'
de la hungara vintro nebuldrona,
kunulojn luktajn por tiu futur.*

*Persekutantoj vane nin ĉaspelas,
Nek nekompreneo nek la sortsever',
nek tentoj, nek arbitroj nin ŝancelas:
l' Ideo vivas, firmas la Esper'!*

*La homo, jen espero nia sola,
la homo, jes, la ĉiospita hom',
por siaj sanktaj rajtoj lukti vola,
reviva el prizono kaj el tomb'.*

*Por hom' ni iras lukti kun fervoro
kaj armas nin la scio kaj la am',
ni volas kaj elluktos, ke l' aŭroro
de l' dolĉa paco tere brilu jam.*


*Mensogo ne disŝiru, nek malico
la sanktan ĉarton de l' feder-brakum'
inter la Hom' kaj Homo, por premiso,
ke l' ĉenoj falu, cedu la Mallum'.*

*Tretita land', homaro perfidata
atendas, fratoj, voke kun helpkri':
la ter' por ĉiuj estu eden' beata,
kaj en patrujo de popoloj frata
feliĉa tero estu la patri'!*

Al ĉiu esperantisto reeĥos el ĉi tiuj strofoj la proverbecaj vortoj de *La Espero* kaj de *La vojo*, kies enhavon tutcerte Juhász Gyula konis. Kaj jes, ni rekonfirmu “*La sanktan ĉarton de l' feder-brakum*”, kaj daŭrigu nian agadon por ke “*patrujo de popoloj frata/ feliĉa tero estu la patri*”!

Jozefo E. Nagy
majo de 2010”.

Bildoj el kaj pri Oradea, fotis: Adri ksaj László Pásztor:



Statuo de Josif Vulkán



Urboparto



Bordo de la Rapida-Kriș (Sebes Körös)



Urboparto de Oradea



La Episkopa palaco kun la statuo de la rumana reĝo Ferdinando la dua

Katastrof-atakita teritorio estas Norda-Hungarujo

Pro la jam de de majkomenco okazanta tuttaga pluvado oni deklaris katastrof-atakita, nian urbon Miskolc kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. La multega pluvo plimultigis la akvokvantojn de la montaraj riveretoj, kiuj enfluante en la urbakave fluantan rivereton Szinva (Sinva), transbordiĝis kaj inundis la riveretapudajn setlejojn /Felső – kaj Alsóhámor, Majlát kaj Diósgyőr/ partojn de urbo Miskolc, kaj eksterurbe proksime al la rivero Sajó, ankaŭ la teritoriojn de du grandaj magazenoj. Do, la jaro de Tigro montras, se la homoj ne bone prizorgas la loĝterenojn, la naturo kapablas repreni kion ĝi volas. La akvofluejoj estis ege antaŭlonge profundigitaj, larĝigitaj. Nun la riveretoj en siaj maldikaj kaj malprofundaj akvofluejoj ne povis enhavi la multoble pligrandiĝintan akvoamason, do la riveretakvoj inundante provis serĉi sian defluejon al la rivero Sajó. Kaj la situacio samas en la teritorioj Miskolc-apudaj vilaĝoj kaj urboj Felsőzsolca, Edelény, Kazincbarcika kaj Sátoraljaujhely. Sed tiujn lastajn setlejojn danĝerigaskrom la propraj riveretoj ankaŭ la riveroj Bódva, Hernád, Sajó aŭ la Tibisko. Sur grandajn teritoriojn inundis la riveretoj kaj riveroj, sed aliloke ni ne havos terproduktaĵojn pro la same grandsurfacon kovrataj kampaj akvoj. La vilaĝaj domoj konstruitaj el sunbakita argilo, ne povis kontraŭstari al la akvopremo, disfalis. Plejgrandparte ties posedantoj je sia maljunaĝo perdis la rezulton de sia tutviva laboro. Je nia pertelefona informpeto, nia unu de urbo Felsőzsolca ellokigita kunulino rakontis, ke: „ Sur la plej altan parton de la urbo kie ili loĝas, la akvo de Sajó nokte atakis. Ĝi kuris tra la stratoj, hurle rompis ĉion, ĝia forta muĝo ŝajnis, kia estas la akvofalo Niagara.” La evakuitan loĝantaron savaŭtomobiloj portadas tuttage ankaŭ nun, en la miŝkolcajn lernejojn, kies gimnastikhaloj estas instalitaj por ili aziloj. Pri ilia sanitara stato, nutrado prizorgas la diversaj subtenaj organizoj, organizaĵoj laŭ la ŝtata financa helpo. Sed multaj homoj ne forlasaa siajn hejmojn, savas ĝin memofere. Ili el- kaj eniras sian donon tra la fenestroj. Ekstere ili trafikas boatea l la nutraĵejoj por akiri lakton, panon aŭ alian nutraĵon. Ni sciiĝis el la elsendo de televezio, ke loke estas dumetra la akvo, alilke 40-60 cm-a la akvoalto. Nun aperas la aro da akvo el Slovakio pere de la rivero Hernád. La akvokvanton de la rivereto Takta ĝi ne povas porti en la riveron Tibisko, ĉar pro ties forte fluanta akvokvanto, la Tibisko reenpremas la akvon de Takta. Ni informiĝis ankaŭ pri tio, ke samas la situacio ankaŭ en la Ipolyság (en departemento Nógrád ĉe la rivereto Ipoly. El la 19 departementoj de nia lando, se estas atakita de la diluvo. Krom la ĝaqrdenaj kaj kampaj kreskaĵoj neniigis ankaŭ multegaj dombestoj bestoj tenitaj pro profitakiro. La teritorioj estas danĝerigitaj pro endemio, epizootio. Ni bezonus longdaŭran senpluvan, varmegan jarperiodon por malaltiĝo, malfluso de la riveretoj kaj riveroj, por sekiĝi de la inunditaj kaj la kampkvaj teritorioj kaj por komenciĝo de la disinfektigoj de la inunditaj teritorioj. Ni esperas, ke post ĉeso de la pluvado, komenciĝos ne nur la restarigaj laboroj, sed ankaŭ la akvofluejojn pligrandigaj laboroj. Tiujn ni forte bezonas, ĉar ni ne scias; kiuj neatenditaĵoj de la klimatsanĝiĝo povos atingi nin en la estonto

Adri Pásztor (la 7an de Junio)



Vidaĵo de urboparto de Felsőzsolca (Wikipedio)



Apud la rivero Sajó

Unu parto de la romkatolika Tombejo Sankta Anna de Miskolc rompiĝis pro la terglitiĝo. La bildo montras tiun parton de la tombejo. Dank' al Dio, la tombo de d-ro Kolomano Kalocsay, la patro de la samnoma esperantista verkisto, ne estas danĝerigita.



Kölcsey: Himno

„...Ho, kompaton, havu, Di’,
inter ĉi pereoj,
ho, hungaron, savu Di’,
el la mar’ de veoj!
Nin delonge ŝiras sort’,
donu gajan jaron,
Por pasint’ kaj por estont’
punis vi l’ hungaron.”

/Citaĵo el la hungara Himno, verkita de Ferenc Kölcsey, esperantigis d-ro Kálmán Kalocsay/Sendis: Anna Marosvölgyi OIK:Kolektaĵo Fajsz/

Niaepoka verkisto de Norda Hungarujo

estas:

Gábor Bari

Ni prezentas nun al vi sinjoron Gábor Bari. En vilaĝo Pácin li naskiĝis, en la jaro 1942a. Enpoŝe per la metia dokumento pri „forĝisthelpanto”, li iris en urbon Miskolc kaj tie vivtenis sin el sia labortereno ĉe la tiama LKM („Lenin” Metalurgia Kombinato). Li pensiuliĝis de 1995. Li ĉiam sentis sin altirata al la literaturo, junaĝe li agadis en aktora trupo. Li estas membro de HAT (Societo de Montosubaj Kreantoj) kaj ankaŭ de MAIT (Reta Asocio de Hungaraj Kreantoj). Liaj ĝis nun aperintaj poemvolumoj estas: Jelek az út mentén (Signoj laŭ la vojo), Múló idő nyomán (Je spuro de pasanta tempo), Versekben álmodó... (En poemoj sonĝanto...)

(Bedaŭrinde, liaj belaj poemoj ĝis nun ne estas esperantigitaj, sed de li poemon vi povas legi en la hungarlingva parto de nia revuo.)

Adrienne sinjorino Pásztor

Libroprezentado - Muzeoandragogio



Kadre de la 81a Libresemajno – Miŝkolca Prezentadserio

Jozefo Szabó

universitata adjunkto prezentis

la libron titolitan Muzeoandragogio

redaktitan de sinjoro Miĥelo Kurta kaj sinjorino Maria Pató.

La prezentado okazis la 4an de Junio 2010a, en la Legohalo de la Filio „Szabó Lőrinc” de la Miŝkolca Urba Biblioteko. /3530. Miskolc, nro 2. placo Mindszent/

En nia revuo la esperantlingva prezento de la eldonaĵo okazos pli malfrue.

Ĉu vi scias, ke

Margit Kaffka hungara verkistino naskiĝis antaŭ 130 jarojn?

Lőrincz Szabó hungara verkisto naskiĝis antaŭ 110 jarojn?

Pri ili vi povas legi en la Vikipedio. Vizitu ĝi!

Ĉu vi scias, ke la temo de la Operfestivalo de Miskolc en Junio, estos: Batók+Eŭropo. La slogeno signifas, ke dum la operfestivalo ĉiuj eŭropaj landoj prezentos sin.

Vizitu kaj ĝuu ĝin!

s-ino Adri Pásztor

Ni funebras

Forpasis sinjorino Klara RAB-NÁDAI

(30. novembro 1934 – 03. junio 2010.)

Pri ŝi sia filo rememoras nun.

„Ŝi konatiĝis kun Esperanto pere de sia patrino, kiu partoprenis kiel interesanto la 1966. jaran UK-n en Budapeŝto. Sian patrinon la travivaĵoj faris dumviva esperantistino. Infanaĝon de mia patrino pasigis en urbo Gyula, en 1945 reiris ŝi en Budapeŝton kune kun siaj tri fratoj. En 1956 edziniĝis ŝi al sia unua edzo. En 1968 ŝi suferis pri tre damaĝa cerbooperacio. La postoperacian resaniĝon plirapidigis la spirita okupado. Tiam proponis al ŝi sia patrino, por ellerni Esperanton. La deziro plenumitis, ĉar estante ŝi invalida pensiulino, havis emon kaj tempon por alproprigo de la artefarita sed tamen vivanta lingvo. Ŝi povis esti verŝajne unu el la geaktivuloj de la hungarlanda Esperanto-movado, havante ŝi tre larĝskalan vortotrezoron dum la jaroj 1970-1980aj. Kiel aktivulino je fino de la 1980aj jaroj: ŝi estis membro de la Redantista Kimitato de Budapeŝta Informilo kaj de la Esperanto Grupo „Kooperativa Stelo” kaj de KELI. Dependante de permeso de sia sanstato ŝi helpis estigi la hungarlandan esperantistan turismon. Ankaŭ pri ŝia civila vivo pridecidis la esperanto-movado. En 1982 urbon Gyula vizitis sinjoro R. Harrison, reprezentante la britan esperantistan kooperativan movadon. Tasko de mia patrino estis por prizorgi la anglan samideanon dum lia tuta restado en Hungario. Post la aranĝaĵo la abgla sinjoro hejmeniris, sed kunportis la memorojn ne nur pri la kongreso, sed ankaŭ pri mia patrino. Liaj rememoroj inspiris lin por baldaŭa reveno en la pli frue nekonatan Mez-Eŭropan landon. Tiam komencis elformiĝi la ĉiam pli fortiĝanta ligo inter la gesoluloj, jam ne junaj homoj, kaj fine retultis, ke la anglaj kaj hungaraj geesperantistoj povis kune festi la novan esperantistan geedzoparon je ilia geedziĝo la 23an de decembro 1983a. (Dum la geedziĝa ceremonio ankaŭ mi partoprenis kiel interpretisto pri Esperanto, ja la ĝojigan: - jes-on – kaj la tekston de ĵuro; la angla Johny volis diri esperante, en la tiam Münnich Ferenc strata - al mla placo Kossuth proksime situanta – geedziĝceremonia salono. Noto de Imre Szabó- la sendinto de ĉi teksto) La tradicio daŭriĝis, kiam lia filo ekkonis sian nunan edzinon dum iu esperanto-aranĝaĵo en Visegrád. Mia patrino definitive translokiĝis en Anglion en 1984. Poste ŝia kontakto malstreĉiĝis po gradoj al la hungara Esperanto-movado, kontraŭ ŝiaj hejmemvizitadoj. Samtempe ŝi iĝis atentinda kaj aminda persono de la anglia Esperanto-movado. Kun sia edzo kiel gefrekventantoj partoprenis la britajn kaj aliajn eksterlandajn UK-jn en Bulgario, inter Norvegujo kaj Kubo. Bedaŭrinda estas, ke dum paso de jaroj laŭgradoj malboniĝis ilia ambaŭa sanstato kaj kiam ili hejmenvojaĝis en Hungarujon en 2000, ili certe ne pensis, ke ne revenos plu.. Ŝia edzo: financa gvidanto de la brita kooperativa-Esperanto movado, forpasis post longa suferado en junio de 2004. De tiam ankaŭ mian patrinon ekregis la malsano kontraŭ tio, ke ŝi heroe luktis kontraŭ ĝi per sia nekredbla volforto kaj optimismo. Ĉi heroa lukto kelkfoje surprizis ankaŭ ŝiajn kuracistojn. Ja ŝi plurfoje revenis de tie, de kie oni ne kutimas reveni. Nun la 3an de junio, laŭ la anglia tempo je la posttagmeza 5,30a, la miraklo forrestis. Ĉi vivo plenplenante per tre multte da amo, travivaĵoj, ĝojoj, luktoj, doloroj, perdoj kaj feliĉoj, finiĝis. Ŝiajn cindrojn kune kun de la siaedzaj, ni metos por eterna ripozo; en la tombejon Farkasréti, laŭ kalvinreligia ceremonio, atendeble je komenco de julio. Pri la ĝusta tempo ni sendoa informon.

Amike salutas: sinjoro Tibor Rab”

Al la funebrantaj familianoj mi esprimas nian kunsenton pro forpaso de ilia amata familiano Klara Rab-Nádai. Laŭ la kortuĉa rememoro ŝi vere meritas la pacan poreternan ripozon. Rememoru pri ŝi ame. Nia Esperanto-movado plimalriĉos sen ŝi. Kun trista saluto:

sinjorino Adri Pásztor, kiu esperantigis rememoron de Tibor Rab.



D-ro Stefano Dobrossy
Muzeo „Herman Ottó” de Miskolc
- daŭrigo -

En la kvina ĉambrego oni prezentas historion de la urbo inter la du mondmilitoj. Eblas senti, ke post la packontrakto de Trianon Miskolc iĝis ekonomie unu el la plej gravaj urboj de Hungario.

Ĝi transprenis la rolon de Kassa /Košice/, kiu pli frue estis la ekonomia centro de Nord-Hungario. La fabrikindustrio determinis ekonomion de Miskolc. Krom la pli frue menciitaj grandentreprenejo estis la maŝinfabrika kaj gisejo de Fried, la Unua Hungara Vitrofabriko AC., la Urba Brikofabriko kaj la Elektra Centralo AC. La hungara ŝtata fer- kaj ŝtalfabriko – post provizora ĉeso - progresis kun novaj uzinpartoj en la 1930-aj jaroj.

Miskolc havis ĉiam tradicion el la komerca vivo de la lando. Ĉefe ĝia agrokulturaĵkomerco estis evoluigita, sed ankaŭ la propra negocretaro abundiĝis. Konstruiĝis sur la placo Búza la tiam plej moderna foirhalo kaj funkciis komercejoj de Weidlichn Meinl kaj Túry. La vizitantoj povas vidi riĉajn objektajn kaj dokumentajn materialojn.

Tiutempe konstanta tagorda afero estis la ĉirkaŭantaj setlejojn por aneksi al Miskolc, sed ĝi ne realiĝis. Kvankam la urbo treege rapide ampleksiĝis. Novaj institucioj, privataj kaj publikdomoj konstruiĝis: infanhospitalo, hospitalo de ferfabriko, poŝtopalaco, ludomoj, popolbanejo de bordo de rivero Sajó, hotelo Anna de Tapolca. Oni konstruis la vojreton, niveligis la placon Deák, konstruis apogmuron ĉe strato Papszer, rekonstruado de la pontoj de Szinva kaj Pece. La akvodukto kaj kanalretaro abundiĝis kaj prepariĝis la stratlumigo. La hungara fisko komencis konstruigi en Lillafüred en jaro 1927 la hotelon de Palaco. Miskolc kaj ĝia ĉirkaŭaĵo havis fremdultrafikan altirforton. Rekonante ĝian evoluon oni ĉi tie aranĝis en 1928 la landan konferencon de la hungaraj urboj.

En tiu ĉambrego oni prezentas vivmanieron de la miŝkolcaj etburĝoj. La meblaroj kaj loĝejgarnituraj aĵoj ilustras la financajn eblecojn kaj gustojn de la etburĝaro. La sur muro pendantaj bildoj estas kreaĵoj de Elemér Halász-Hradil kaj Julio Rudnay. /Elemér Halász-Hradil estis konata miŝkolca pentristo de ĉi tiu epoko./

Tiu fakto influis spiritan vivon de Miskolc, ke la Juroakademio logiĝis de Eperjes /Prešov/ al Miskolc kaj ankaŭ la evangelia altlernejo en Miskolc funkciis (1910-1920). Ne delonge oni malfermis la pedagogiajn altlernejojn por lernantinoj (rom.kat. en 1927, izr. en 1929, ref. en 1944).

Novan konstruaĵon ricevis: ligno- kaj metalurgiindustria faklernejo, la evangelia pedagogia altlernejo kaj la ortodoksa izraelida kvarjara mezlernejo. La Muzikpalaco konstruiĝis. Nomdonanto de katolika gimnazo iĝis Georgo Frater, tiu de ref. realgimnazio iĝis Jozefo Lévy, tiu de ref. gimnazio por lernantinoj iĝis Paŭlo Tóth, tiu de ĉefreala gimnazio iĝis Johano Hunfalvy, tiu de supera komerca lernejo iĝis Ferenc Deák, tiu de muziklernejo iĝis Eŭgeno Hubay. En la urbo 16 bazlernejoj funkciis kaj en 1922 fondiĝis la popoluniversitato. En 1934 malfermiĝis la popollerneja demonstra kolektaĵo, kiun oni nomis kiel instruseminario.

Partoj de la socia vivo estis la unuiĝoj inter la du mondmilitoj. En 1919 fondiĝis Kanto- kaj Muzikrondo de la Trajnakompanantoj de la Miŝkolca Hungara Ŝtatformo. En 1927 fondiĝis la Miŝkolca Metiista Burĝa Kantounuiĝo. En Diósgyőr funkciis la „Bonfeliĉo” kantorondo. Laŭ la dokumentoj la bonfaremaj unuiĝoj organizadis laŭ religia fono.

La ekspozicio okupiĝas en aparta unuo pri la dua mondmilito. Ĝi prezentas tiujn damaĝojn, kiujn kaŭzis ĉefe la aeratakoj, sed estis damaĝoj ankaŭ post foriro de la germanaj taĉmentoj. La unua bombado atingis la urbon la 2-an de junio 1944.

Kaj la fervojstacidomo kaj la foirhalo ruiniĝis. La forirantaj germanaj taĉmentoj escepte de unu ĉiujn pontojn de rivero Szinva eksplodigis. La germanoj fermis la urbajn judojn al getoo, poste forportis perforte. Friessner defendis la urbon helpe de regimento kaj brigado, sed la 3-an de decembro 1944 taĉmentoj de la 27-a soveta militarmeo okupis la urbon.

Nacia komitato fondiĝis la 16-an de decembro 1944, kies vicprezidanton, Adalberton Zsedényi /jedénji/, jurakademian instruiston oni elektis prezidanto de Parlamento en Debrecen.

Urbhistoria ekspozicio de la muzeo ĉe ĉi tiu dato kaj okazintaĵo finiĝas.

Literaturo

Deziderio Bekes:/redaktoro/: Epizodoj de historio de Miskolc, 1985.

Nikolao Benedek: Miŝkolcaj kubŝtonoj, Miskolc, 1986.

Csaba Csorba./red./ Arkivaj dokumentoj de mezlernejoj de Miskolc. Borsod-Abauj-Zemplén departementaj arkivaj kajeroj,29. Miskolc,1989.

Stefano Dobrossy: Historioj de miŝkolcaj gastejoj kaj la gastigado.,1745-1945. Miskolc,1985.

Stefano Dobrossy-László Veres: Inundo de Miskolc 1878-1978, Miskolc, 1978.

Adalberto Halmay- Andreo Leszih: Miskolc. Monografio de hungaraj urboj. V.

Budapest.1929.

Nikolao Kamody: La miŝkolca telefoncentro estas 100. jara. Miskolc. 1989.

Ludoviko Marjalaki Kiss: Historiaj eseoj. Miskolc. I. Miskolc.1987.

Anna Szegfői Seres: Aldonaĵoj al historio de trafikado de urbo Miskolc. Miskolc 1988.

Johano Szendrei: Historio kaj universala topografio de urbo Miskolc. I.-V.Miskolc.1886-1911.

Petro Tóth: Statutaro de Miskolc./1573-1755/Borsod-Abauj-Zemplén departementaj arkivaj kajeroj.23. Miskolc.1981.

Petro Tóth: Protokolo de konsiliaj kunsidoj de urbo Miskolc /1569-1600/, dokumentoj de historio de urbo Miskolc. I. Miskolc. 1990.

La ekspozicion aranĝis:

-Stefano Dobrossy

-Eva Gyulai/Djulai/

-Georgina Németh

-Tibor Rémiás

-László Veres

/ La hungarlingvan tekston de d-ro István Dobrossy, esperantigis s-ro László Pásztor/



La bildoj montras ekstere kaj interne la konstruaĵon Vigadó (Restoracio-Amuzejo) de la Miŝkolca Popolĝardeno (Vikipedia foto)



La bildo montras unu parton de la Urbhistoria ekspozicio de la Miŝkolca Muzeo „Herman Ottó” (Vikipedio)

Aforismoj

- 1 Onidire infanoj, frenezuloj kaj filozofoj diras la veron. Tial do infanoj estas batataj, frenezuloj kaj filozofoj nekomprenataj.
2. Jubilea parolado: tio estas disvolvado de unuminuta ideo je duhora vortaro.
3. Nur tiam ni amas reale kaj vere, kiam ni amas senkiale, vane.
4. Ju pli alten ni flugos, des malpli grandaj ni vidiĝas por tiuj, kiuj flugi ne kapablas.

Sendis: s-ro Marian Zdankovsky (PL)

El nia leterkesto

Albanio - Ĝustigo de artikolo aperinta en la marto-aprila retrevuo:

„Tre karaj, mi ĵus malfermis la marto-aprilan numeron de via ŝatata revuo. Multan dankon. Sed estas problemeto: La foto prezentita tie estas ne mia, sed de la kormemora forpasinta bulgara profesoro Petko Arnaudov. Mi elĉerpis la tekston el miaj du libroj jam eldonitaj en Albanio pri la amuza matematiko. Honore al prof. Arnaudov mi uzis lian foton kiel ilustraĵon. Do, nun la homoj povas imagi ke la foto montras min: Bardhyl Selimi. Tiuj kiuj konas Petko Arnaudov, miros kaj ŝokiĝos, same tiuj kiuj konas min. Nur la ceteruloj kiuj konas nek min

nek Arnaudov indiferentos. Do, vi estas petata plej konvene korekti tiun eraron. Multan dankon.

Noto: alkiro estas mia propra foto je via plezuro

Bardhyl Selimi”



La foto montras:

sinjoron Bardhyl Selimi, leganton de nia retrevuo Nordhungaria Informo

Germanio-Düsseldorf - Ŝerco

Kara, kiom vi pezas?

Kun okulvitroj centdudek kilojn.

Kaj sen okulvitroj?

Sen okulvitroj mi ne povas vidi la ciferojn.

Sendinto de la ŝerco estis: s-ro Claus Winterhof

Germanio - Herzberg

Dujara Comenius-projekto kun granda sukceso finiĝis en Herzberg, Germanio

Etaj infanoj kun ĝojbrilaj okuloj el tri bazlernejoj, entuziasmaj gepatroj, laboremaj gekolegoj – tiel ni povas plej mallonge resumi la finan eventon de la kelkjara kunlaboro inter la bazlernejo en Bar Hill (Britio), Komlóstetői Általános Iskola (Miskolc, Hungario) kaj Nicolai bazlernejo (Herzberg am Harz, Germanio).

Kion ni celis? Montri la lernfaciligan rolon de Esperanto per instruado de la lingvo al junaj, 6-9 jaraj lernejanaj, montri, ke eblas vekti la intereson de infanoj al lingvolernado, konsciigi ilin pri la propra gepatra lingvo kaj pri estimo al la lingvo de la partneroj. Celo estis ankaŭ montri, ke jam en juna aĝo lingvaj barieroj povas malaperi, komunikado, interagado povas sukcese funkcii kaj veraj amikecoj povas ekesti.

Kiel ni komencis? Ni ellaboris la projekton en januaro 2008, sendis la dokumentojn al la opaj naciaj agentejoj, kiuj prizorgas la 'Dumviva Lernado' programon de EU (Lifelong Learning Programme) kaj petis subvencion enkadre de lerneja partnerecprogramo Comenius. Jam antaŭ la findecido pri la projektsubvencio ni mem organizis la unuan renkontiĝon en aŭgusto 2008 inter Nicolai-lernejo en Herzberg kaj la brita Bar Hill lernejo, kiu pioniras en la enkonduko de la Springboard-projekto kaj bonsukcese instruas Esperanton laŭ la speciala instruprogramejo. La bonege sukcesinta unua vizito de la brita grupo al Herzberg trankviligis nin kaj kuraĝigis ĉiujn partnerojn al la daŭrigo. Post la akcepto de la Comenius-projekto komenciĝis la realigo en aŭtuno 2008 kaj postulis de la projektgvidantaj gekolegoj sindediĉon, multe da kromlaboro kaj konstantan interagadon.

Kion ni faris? La Esperanto-instruistoj el la partnerlernejoj ekinstruis la klasojn, Esperanto-grupetojn en la propraj lernejoj: Tim Morley (GB), Ilona Fedor (HU) kaj Otto Kern kun Zsófia Kóródy kaj kelkaj porokazaj helpantoj. Dum pli ol du jaroj la infanoj el la tri landoj lernis Esperanton laŭ speciale ellaborita projektmaterialo, ludante, kantante, praktikante. Ili interŝanĝis mesaĝojn, desegnaĵojn, fotojn, kantojn, filmetojn. Foje-foje ili ankaŭ interparoladis per la reto kaj skajpo. En la programo estis ankaŭ la preparado de filmo pri la propra lernejo kaj prezento de la memfarita filmo al la publiko.

Kie kaj kiel ni renkontiĝis? Dum la 2 jaroj ni havis tri renkontiĝojn dank' al la Comenius-subvencio, kiu ebligis la veturadon ne nur de po 6-10 infanoj per lando, sed ankaŭ de patrinoj aŭ patroj – ja temis pri 6-9 jaruloj kun kiuj kompreneble kunveturis ankaŭ la projektprizorgantaj instruistoj.

La unua kunveno okazis en Bar Hill en aprilo 2009, la dua en Miskolc en oktobro, kaj la lasta en Herzberg inter 9-13 aprilo 2010. Gastoj, gastigantoj ne nur interkonatiĝis, sed profunde amikiĝis. Dum la unua renkontiĝo en Britio oni spertis ankoraŭ iom da distanciĝo, grupiĝo kun samlandanoj, sed la komunaj ekskursoj, ludoj kaj prezentadoj grandparte forigis tion. Esperanto servis kiel pontolingvo sed la infanoj lernis ankaŭ multajn vortojn, salutadon en la opaj naciaj lingvoj. Urborigardado, ekskursoj al belaj kaj interesaj lokoj zorgis pri tio, ke ili multe spertiĝu pri la kulturo, kutimoj, lingvoj, vivo de siaj partneroj. La gastfamilioj estis ideala loko por la etuloj por ricevi enkondukon en alilanda ĉiutaga vivo, por kunagado kun samaĝuloj, integriĝo en la vizitita socio. Estis ĝojige vidi, sperti, kiel nia planita pedagogia programo realiĝas, kiom senprobleme la infanoj kondukis en la novaj cirkonstancoj, kiom amikeme ili rilatis unu al la aliaj.

Post ĉiu vizito fortiĝis la amikeco kaj dum ĉiu adiaŭo eklarmis kelkaj okuloj... Ni certas, ke la travivaĵoj restos neforgeseblaj, la kontaktoj daŭros, la geamikoj gardos la belajn memorojn en siaj koroj.

Kiel finiĝis la projektperiodo? Dum la lasta staĝo en Herzberg okazis minej-muzea vizito en Clausthal-Zellerfeld, ekskursoj al Goslar kaj Bad Harzburg, urborigardado en Herzberg, vizito al la kastelo kaj al la Esperanto-Centro.

La tri projektpartneroj kun helpo de direktoro de Nicolai-lernejo en Herzberg, s-ro Frank Keller, la kolegaro kaj grupo de gepatroj preparis grandiozan adiaŭan festvesperon. Krom la britaj kaj hungaraj gastoj kaj germanaj gastfamilioj, infanoj partoprenis ankaŭ la aliaj instruistinoj de la lernejo, ĉeestis urbestro Gerhard Walter, la gimnazia rektoro H.-J. Bötzel, geamikoj de la Esperanto-grupo kaj multaj aliaj homoj. El Hungario alvenis ankaŭ du instruistinoj de fremdaj lingvoj, la britan lernejan delegacion el Bar Hill akompanis la vicdirektoro s-ro Sanjay Mistry kun sia edzino.

Ĉirkaŭ 100 homoj ĝuis agrablan adiaŭan festvesperon kun ludoj en Esperanto, salutoj, paroloj, filmoj, kantado kaj danprezentado de la infanoj. Oni fotis, filmis, interparoladis, kaj finis ĉion abunda festbufedo.

Tiu ĉi sukcesa projekto kaj internacia evento kreis multajn novajn geamikojn, la lernantoj evidente ekŝatis lingvolernadon, la gepatroj, instruistaro komprenis la gravecon de internacia kunlaboro per Esperanto. Ni certas, ke tiu laŭdinda kaj imitinda modelprojekto postlasos ne nur multajn fotojn, murafiŝojn, filmojn, ktp. sed havos – kiel ni antaŭvidis kaj planis en la projektpriskribo – bonan varbefikon por la lingvo en la lernejoj, en la urbaj komunumoj, inter gepatroj, parencoj, instruistaro, lernejoj aŭtoritatoj, edukinstitucioj.

Kiel plu? Krom la jam pretaj mallongaj filmoj pri la tri lernejoj estos pretigata DVD-filmo pri la agadoj, eventoj, rezultoj de tiu dujara kunlaboro, kiu resumos ĉion kaj estas sendenda ankaŭ al la naciaj Comenius-agentejoj. (Grandajn meritojn en tiu laboro havas Tim Morley, kiu ne nur zorgis pri la esencaj materialoj, sed estis la ĉefmotoro de la tuta projekto.) Krom tio ni ŝatus zorgi pri tio, ke la amikaj, familiaj kaj lernejoj kontaktoj sendepende de la projekto plu daŭru, la spertoj estu transdonataj al aliaj lernejoj, gekolegoj.

Pri la temoj de la projekto, enhavo, detaloj de la instruprogramo ni raportos aparte.

Interesiĝantoj pri simila internacia kunlaboro, projektontoj, bv. turni vin al Tim Morley, Ilona Fedor aŭ Zsófia Kóródy

Alvoko: En Herzberg am Harz okazos la jam tradiciaj oktobraj pedagogiaj tagoj (TORPEDO-6) inter 8-10 oktobro 2010, kun aldonaj tagoj 11-13 por ILEI-seminario pri subvenci-petado. La prelegontoj ne nur teorie, sed per praktika gvidado povos helpi al la partoprenantoj konatiĝi kun projektebloj, subvenci-fontoj. Bonvenon!

/ Sendintoj: Zsófia Kóródy–Ilona Fedor/

Francio: Lyon – Tiszafüred

„*Karaj geamikoj!
El urbo Tiszafüred,
esperantista
grupeto el



Hungario:

la



lernejo "Bán Zsigmond" ĝuste en Francio.

partoprenas Komenius-komenciĝis en septembro, 2009. Nia

en Bulgario, nun ni partoprenas la duan, en Francio, en urbo Lyon. Ĉi tie estas grupo el Bulgario, Pollando, kaj kompreneble ĉi tie

la francoj. Entute estas pli ol 40 gelernantoj kaj instruistoj. El urbo

Tiszafüred, el kalvina lernejo "Bán Zsigmond", ni venis dekoje, 8

nun estas

Ni

projekton, kio

unua vojaĝo estis

la

estas

lernantoj kaj 2 geinstruistoj. Vi
ĉiutage (ĝis la 9-a de
www.banzsigmond.

Elkore salutas

Tiszafüred (la 3an



povas rigardi fotojn pri la veturado
majo) hungare en
hu

ĉiun el urbo Lyon:
Julianna Vas-Szegedi, Hungario,
de majo 2010)''

Hungario – Miskolc – Observatorio

„Estimata sinjorino Pásztor!

Mi tre dankas la sciigon pri apero de la plej lasta numero de via revuo. Bonvolu pardoni, sed enlegante ĝin, mi devas fari kelkajn rimarkojn al vi. Permesu por fari kelkajn kompletigojn. En via artikolo titolita: Ĉu meteorito transflugis super Norda Hungario? – vi skribis pri la ĉiela spektaklo okazinta la 28an de februaro 2010a. Nu, de tiam pruviĝis jam, ke vere unu meteorito kaŭzis la eksterordinaran travivaĵon kaj pluse ties tre brila apero, kies nomo estas: Fajroglobo, alinome: Bolida. Krome mi ŝatus akceptigi unu ĝustigon: la meteoritoj povas esti ne nur ruĝkoloraj! Do, en la artikolo la konkludo, ke ĝi ne povis esti meteorito ĝuste pro sia vidita alikoloro, ne tute akordiĝas al la vereco, kaj niaj konoj.

Es#implene: Leitner Zsolt: gvidanto de la „Szabó Gyula” Observatorio de urbo Miskolc.”

Norda Vjetnamio

„Estimata s-ino Adrienne Pásztor,

Mi ege ĝojas ricevi vian informon. Elkoran dankon.

Mi tuj sendas al vi 1 paĝan informon pri mia ĉefurbo. Bv. legi en kunsendaĵo.

Mi tralegis la paĝaron de Hungarujo kaj gratulas, admiras vian laboron por bela, riĉinforma retpaĝo.

Bv. viziti la retpaĝon de VEA: <http://e.vea.vn/news/detail.php?fx=15&zx=233>

Mi denove dankas vin.

Kore,

Phuong Mai

Vic-prezidantino de VEA

Ĝen. Sek. de HANEA

Hanojo, urbo kun miljara bela kultura tradicio

La ĉefurbo Hanojo estas antikva kaj impona urbo. De post 1010, kiam reĝo Ly Thai To publikis edikton pri ĉefurba translokiĝo, Thang Long - Dong Do - Hanojo aĝas preskaŭ 1000 jarojn. Tra la historiaj ŝanĝiĝoj, Thang Long - Hanojo, kun miljara kultura amplekso ĉiam gardas en si mem multajn senprezajn vestigojn. Ene de la nunaj administraciaj limoj, Hanojo ankaŭ inkluzivas: la antikvan ĉefurbon Co Loa de la Au Lac ŝtato pli ol 2000 jarojn

antaŭe; la Hoang Thanh citadelon kies arkeologia malkovro ĵus efektiviĝita sur nur unu angulo ja instigas ĉies admiron pro sia amplekso, kun perspektivo fariĝi kultura vestiĝo ne nur por Vjetnamio; la antikvan urbon unike alinomita la “urbeto kun 36 kvartaloj” - nedisigebla parto de la antikva citadelo Thang Long, ĉiam ekzistantan por kontribui al la fizionomio de Hanojo; la Templo de la Literaturo kun la iama Nacia Universitato kun la Khue Van Cac konstruaĵo elektita kiel simbolo de la urbo...

Dum la lastaj jaroj, Hanojo grandpaŝe disvolviĝis je skalo, amplekso, fizionomio samkiel nivelo kaj kvalito; ambaŭ ekonomie kaj kulture, kaj pro ekonomia disvolviĝo kaj pro plibonigo de la popola vivo. La ekonomio rapide kaj daŭre kreskas. La ĉefurbo iĝas pli kaj pli vasta kaj komforta. La internaciaj rilatoj pli kaj pli larĝiĝas. Hanojo havas amikecajn kunlaborajn rilatojn kun pli ol 60 ĉefurboj kaj urboj en la mondo. Freŝdate multaj internaciaj konferencoj organiziĝis en Hanojo kiel: la Supra Konferenco de la Franclingvaj parolantaj Landoj; la Supra Eŭropa-Azia Kongreso ASEM 5; la Konferenco de la 21-a jarcenta Reto de Aziaj Urbegoj, ktp... La sukceso de tiuj konferencoj okazintaj en sekurecaj kondiĉoj iom post iom formis la bildon de unu Hanojo - amika rendevuo. Krome, la atingiĝoj de Hanojo dum la jaroj de renoviĝo tage post tage plialtigis ties prestiĝon sub la okuloj de internaciaj amikoj. En 1999 Hanojo estis aprezita de UNESKO kiel “urbo kun plene impresa disvolviĝo” kaj tiu internacia organizo ĝin elektis kiel la ununura urbo de la azia-pacifika regiono ricevante la titolon “Porpaca urbo”. Okaze de la 990-a datreveno de sia fondiĝo, Hanojo havis la honoron ricevi de la Partio, la Ŝtato la altvaloran titolon “Heroa Ĉefurbo”.

En 2005, Hanojo celebras la 995-a datrevenon de la fondiĝo de Thang Long - Hanojo kaj estas alvenanta al sia miljara datreveno en 2010. La restaŭrigo, plibonigo kaj konservado de ties senvaloraj vestiĝoj por la nuna kaj la futuraj generacioj estas ĝia honoro kaj respondeco, esprimante la dankemon de nia generacio kaj tiu de la venontaj generacioj al la bonfaroj de niaj praaĵoj kiuj fondis kaj defendis la nacion. Tamen tiu tasko postulas grandegajn financajn kaj materialajn rimedojn. Hanojo bezonas sennombran elkoran entuziasmon, talenton kaj intelekton de ĉiu ĉefurbano, de la tutlanda loĝantaro kaj de la komunumo de vjetnamoj loĝantaj en eksterlando samkiel de internaciaj amikoj el la kvin kontinentoj por dividi kun iu spertojn pri konstruado, riparo, restaŭro de kulturaj monumentoj, historiaj vestiĝoj en la ĉefurbo okaze de tiu granda datreveno.

Kiel koro de la tutlando, nacia politika-administracia centro, granda kultura, scienca, eduka, ekonomia kaj internacia centro, Hanojo daŭre klopodos por certigi solidan politikan stabilecon, socian sekurecon; neskueble disvolviĝi ekonomion, kulturon sub ĉiuj ĝiaj aspektoj, starigi Hanojon civiliza, distingiĝa, moderna kaj konservi, valorigi la miljaran belan kulturen tradicion de Thang Long - Hanojo, por indi la titolon de heroa ĉefurbo kaj porpaca urbo.

NGO THI THANH HANG

Vic-Prezidanto de Popola Komitato de Hanojo

Hungarlandaj Ekskursoj **Tiszaszederkény – Tiszaújváros**

Nia vizito al **Tiszaszederkény** okazis la 25-an de aprilo 2010. Tiszaszederkény estis parto de Tiszaújváros, ties loĝantoj diris, ke antaŭ tri tagoj akvo de rivero Tibisko inundis sian inundejon, kie la akvonivelo estis sub la digo 10 metroj. Ĝis la maleolo atinganta akvo ondis sur tiu betonvojo, kiu kondukas al bordo de la vivanta Tibisko. La akvo inundis ankaŭ la semajnfinajn konstruaĵojn, kiuj estas proksime de la digo. Nur tiuj konstruaĵoj ne damaĝiĝis,

kiujn la posedantoj konstruis sur altan plinton. Ni piediris sur tiu betonvojo ĉ. unu kilometran distancon. Ne kuraĝis ni devojaĝi, ĉar ambaŭ duflanke ankoraŭ marĉo estis, kie la ranoj serenadis dum la agrabla printempa varma vetero. Pli malproksime de la vojo rande de la robinioarbaro post la retiriĝado de la akvo la herbo komencis kreskadi, sed la poploarboj staris ankoraŭ en akvo. Ni ne kuraĝis pluiri sur la vojo, kvankam sur la vojo jam ne estis akvo, sed pro la de akvo portitaj rubo kaj ŝlimo la vojo iĝis kota kaj gluema. Kiel kompenco ni povis rigardi el la aŭtobuso la mirinde trankvilan bluan akvon de la rivero Tibisko. En la aŭtobuso iu maljunulo ankaŭ tion diris, ke ĉ. post unu kaj duonsemajno estos atendebla la jare ripetiĝanta mirinda vidindaĵo de la naturo: „ ekfloro de Tibisko.”

Pri tiu ĉi temas la bela hungara kanto:

Tibisk' estas tombejo

Kiam dum printempo la Tibisk' ekfloras,
Papilioj are supre meteoras.
ilia eta viv' sekundas nur, ne horas,
Tibisk' estas tombejo, kiam ĝi ekfloras.

Ankaŭ nia amo tiel efemeris,
apenaŭ naskiĝis, tuj ĝi malaperis.
Miaj du okuloj ĉiam dense ploras,
Tibiskon mi sopiras, kiam ĝi ekfloras.

Frida pluv' aŭtuna la arbaron frapas,
Mia arda amo viajn paŝojn gvatas.
Tibiskborde mia koro vin adoras,
Mia mort', Tibisko, kiam ĝi ekfloras.

/La hungaran kanton esperantigis sinjoro Nagy Josif (Rumanio)/

La longvosta efemero /*Palingenia longicauda*/ apartenas al ordo de la efemeroj /ephemera/. Ĝi estas 8-12 cm-ojn longa kolorpompa insekto. Ĝia flugilenverguro atingas 6-7 cm-ojn. Ili metas siajn ovojn sur nivelon de la akvo kaj malleviĝas sur fundon de la rivero, tie fosas sin en la teron. Ili atendeblas ĉefe dum printempa kaj somerkomenca svarmadoj, dume amdancas. Svarmado de la longvosta efemero komenciĝas en la vesperaj horoj kaj daŭras dum tri horoj. Kiel komenco de la svarmado la en argila bordoflanko vivantaj tri jaraj larvoj leviĝas sur nivelon de la akvo. Tiun strebon helpas la sub ekstera kovrilo akumuliginta gaso. La flugilojn havanta insekto sur la akvonivelo eliĝas el la larvohaŭto. Unue la viraj papilioj ekaperas, tiuj flugas al la bordo, kie iĝas pere de haŭtoŝanĝo pariĝkapablaj papilioj. La vira papilio havas longan voston kaj serĉas la inojn super la akvo flugante. La el larvohaŭto eliĝanta ino estas tuj pariĝkapabla. Post la pariĝo la ino flugante super la rivero komencas la kompensadan flugon. Ĝi flugas super Tibisko je 5-10 metroj kontraŭ la akvofluo. Poste ĝi malleviĝas sur la akvon, kie metas la ovojn kaj pere iĝas. La flugilaj insektoj igas la akvonivelon, kvazaŭ ĝi estus kovrita de milionoj da etaj floroj. Iam ĉi tiu efemero-specio en Eŭropo estis tre ege disvastiĝinte, sed nuntempe sur tiu ĉi kontinento troveblas en malmultaj lokoj. En nia patrujo grandamase troveblas nur en rivero Tibisko kaj en ĝiaj flankoriveroj.



Tiszavirág = Floro de Tibisko / Longvosta efemero, latinnome: Polingenia longicauda/

Historio de Tiszaszederkény (Tisasederkenj)

Vilaĝon Tiszaszederkény oni menciis unue en ĉarto en 1268, laŭ nomo Seederkin. Post konstruo de fortikaĵo de Ónod, – kiel mi scias - la teritorio de la vilaĝo apartenis al latifundio de tiu fortikaĵo kaj dume posedantoj de la fortikaĵo ŝanĝadis, kaj ŝanĝadis ankaŭ posedantoj de la vilaĝo Tiszaszederkény. La vilaĝo vivis sian prosperan epokon Tempe de Georgo Rákóczi kaj lia edzino, Suzana Lórántffy, kiuj estis mastroj de fortikaĵo de Ónod. Memorante je Suzanan Lórántffy, la setlejo farigis statuon pri ŝi en la jaro 1994.

Inter Tiszaszederkény kaj Miskolc estas 35 km distanco. Ĝi situas en la t.n. Kamparo de Borsod, ĉe renkonto de rivereto Sajó/Ŝajó/ kaj Tiso, en departemento Borsod-Abauj-Zemplén, en Nord-Hungario. Ni veturis de Miskolc per interurba aŭtobuso ĝis Tiszaujváros, de tie per loka aŭtobuso al Tiszaszederkény.

Tiszaszederkény estas ĝardenurbo de Tiszaujváros. Ĝi havas purajn, florajn stratojn, belajn familiajn domojn kaj konservis kelkajn memoraĵojn de la malnova vilaĝa vivo: la fojnejon, stalon, maizosekigejon kaj ejon por rosto lardon, kiun oni faris el fumajejo. Ni vidis antaŭ la domoj kaj ĉirkaŭ la domoj florbedojn kaj ĉiamverdajn pinojn. Multe da printempaj floroj montris la reviviĝantan naturon.

Tiszaujváros (Tisaujvaroŝ) povas danki sian eston al la socialisma industriigo. Oni komencis konstrui la urbon la 9-an de septembro 1955. Ĝis 1970 Tiszaujváros uzis nomon Tiszaszederkény. La eksa vilaĝo estas interna area urboparto de Tiszaujváros. Oni konstruis unue varmoelektrejon. Post tio komencis la elektroenergia produkto, oni komencis konstrui la Kemian Fabrikon de Tiszaujváros. En 1961 la Farbofabriko komencis funkcii, post kelkaj jaroj ankaŭ kiel la kemisterkfabriko, la polietenofabriko, la olefinfabriko kaj la JABIL-kompanio kun limigita respondeco. La pli lasta kompanio faras muntadojn de la poŝtelefonoj. Por la fabrikaj laboristoj estis bezonataj la loĝkvartaloj. En 1962 loĝblokaroj konstruiĝis kaj vendejoj malfermiĝis. La 1-an de junio 1961 la vilaĝa konsilantaro el Tiszaszederkény translokiĝis al la nova setlejo. Tiel finiĝis unua periodo de la urbokonstruo.

Dum la dua periodo /1962-1965/ oni faris pli novajn konstruaĵojn. Por la laboristoj estis certigitaj 1464 loĝejoj. La 31-an de marto 1966 Tiszaszederkény ricevis ankaŭ oficiale la urban rangon. Inter 1966 kaj 1970 – dum la tria periodo de la urbokonstruo – du bazlernejoj, unu mezlernejo kaj unu kulturcentro konstruiĝis. Tiutempe la urbo havis 10 mil loĝantojn.

La 22-an de aprilo 1970 – okaze de 100. naskiĝo de Lenin – la urbo nomis sin al Leninurbo.

Dum la 1970-aj jaroj Leninurbo iĝis vera urba centro de la ĉirkaŭantaj vilaĝaj setlejoj, ĉar ĝiaj institutoj kaj priservadoj konstante abundiĝis. Rezulte de tiu ĉi la 31-an de decembro 1981 Leninurbo iĝis la distrikta rezidejo anstataŭ la proksima Mezőcsát/Mezőcát/.

Dum la 1980-aj jaroj la evoluo iomete malrapidiĝis. Post la reĝimŝanĝo la 1-an de februaro 1991 la urbo ricevis la nomon Tiszaujváros.

Preskaŭ 100 procentoj de la loĝantaro estas hungara. Malmulte da personoj estas devenantaj el la cigana nacia minoritato. Laŭ indikoj el la jaro 2009 la urbo havis 18021 loĝantojn sur 46041 kvadratkilometra teritorio.

Famaĵoj: Termalbanejo, grekkatolika preĝejo, „Derkovits” Kulturcentro en la Urba Biblioteko, Sportcentro. La urban trafikon de aŭtobusoj certigas la Kompanio Borsod Volan. En la urbo ne estas hospitalo, kaj ĝi havas bonegan fakkuracistan prizorgon. La termalbanejo havas 57 C-gradan termalakvon, kiu elŝprucas al la ternivelo el sub la tero el 1200 metra profundo. La akvo estas kuravefika, ĉar ĝia salo,- natrioklorido kaj hidrogenkarbonatoenhavoj estas altaj. Pro tio la akvo taŭgas kontraŭ artikaj doloroj, kronikaj ginekologiaj kaj urologiaj malsanoj. Temperaturo de la akvo estas en la basenoj: 32,34,36 kaj 38, 40 C-gradaj.

Tiszaujváros estas „Juvelo de Suda Borsod”. Kiel distrikta rezidejo organizite partoprenas kulturan, komercan kaj industrian vivon de la regiono.

Aranĝoj de la urbo: Landan signifon havanta TRIATLON-grandsemajno, kiun finas per triatlon-mondokonkurso. En 2007 oni aranĝis la 12. Hungarlandan triatlon-mondokonkurson.

En la teatroĉambro de la kulturdomo oni kutimis aranĝi ofte kantoĥorajn, teatrajn, flikpecon kudrantajn, dancajn kaj literaturajn aranĝojn.

En ĉiuj jaroj oni organizas printempan festivalon kaj kristnaskajn aranĝojn.

Fraturbroj de la urbo estas:

Świętochłowice: en Pollando

Rimaszombat: en Slovakio

Ludwigshafen: en Germanio

Csíkszereda: en Rumanio

/Laŭ la paroladoj kun niaj babiladpartneroj kaj la Hungara Libera Enciklopedio skribis s-ino Adri Pásztor, esperantigis s-ro László Pásztor/

Fortikaĵo de vilaĝo Ónod, laŭ la hungara Vikipedio



Statuo de sinjorino Suzana Lórántffy, fotis s-ino Adri Pásztor:



Ŝercoj

Ĉe la kuracisto

- Sinjorino, nervoj de via edzo tutkaputiĝis. Li bezonas senĝenan trankvillon – diras la kuracisto.
- Mi scias, sinjoro doktoro. Ankaŭ mi diras al li ĉiutage trifoje!

Ĉu la knabo estas alies infano?

Steĉjo malpurigas sin, li aspektas tute nereconeble.

- Kiel vi aspektas? Tuj vi ricevos du vangofrapojn! – krias al li la patrino.
- Ne! Povas esti, ke li ne estas nia filo! – intermiksas sin la patro.

/La ŝercojn esperantigis László Pásztor/

La jaro 2010, estas ankaŭ Jaro de la Biodiverseco

La signifo de la biodiverseco - hungare - multspecieco de ĉiu heredita vario de la vivantaro, de la diversecoj inter la ekosistemoj tra la ilin konsistantaj specioj, sed ĝis la genetikaj variantaj provizaĵoj inter la unuopaj specioj. Ni vicigas ĉi tien ne nur la multspeciecon de specioj de la Tero, sed ankaŭ la enspecian variobiliton kaj la variecon de la vivantaraj komunumoj. La scienco de la Ekologio okupiĝas pri la biodiverseco. La Pakton de la Biologia Divers-specieco oni ratifikis la 13an de junio 1992, en la urbo Rio de Janeiro, dum la Konferenco de UNO pri „Ĉirkaŭaĵo kaj Evoluo”. En Hungario unue la 22an de majo 2006 estis organizita Tago de la Biodiverseco.

(Laŭ la hungara Vikipedio kompilis kaj esperantigis: Adrienne sinjorino Pásztor)

Sekso de la muŝo

Foje la edzino iris en la kuirejon kaj ekvidis sian edzon enmane per muŝomortfrapilo.

- Kion vi faras? – demandis ŝi sian edzon.
- Mi ĉasas muŝojn – respondis la edzo.
- Kaj kioman vi frapis jam ĝis nun? – demandis la edzino.
- 3 virojn kaj du virinojn – sciigis la edzo.

La edzino surprizite faris demandon denove:

- Pri kio vi scias; kiu estas la viro kaj kiu la virino?

Informo de la edzo estis:

- 3 sidis sur la botelo de biero, 2 sidis sur la telefonaparato.

/La hungarlingvan tekston de s-rino Maria Ballán, esperantigis Adrienne s-rino Pásztor/

Esperantistaj Aranĝaĵoj 2010 **Internacia Junulara Lingva – Tendaro en Jászberény**



Blazono de urbo Jászberény – Laŭ la Hungara Vikipedio

La internacia Junulara Lingva Tendaro en urbo Jászberény, okazos inter 11-18.07.2010.

La urbo Jászberény (Jasberenj) situas en la regiono de la hungara Norda-Ebenaĵo, en la departemento Jász-Nagykun-Szolnok, ĝi estas centro de la etregiono Jászberény. Nombro de ĝia loĝantaro estas 27134 homoj (2009). Ĝi havas: la duan plej grandan populacion de la departemento. Sur la ambaŭ partoj de la rivero Zagyva situas la urbo. Ĝiaj distancoj estas: 79 kilometrojn al Budapeŝto, 45 kilometrojn estas al Szolnok, la rezidejo de la departemento

La tendaro estos vere unu granda konstruaĵo kun korto kaj ludejo - situanta 10 km distance al la urbo – en veran naturan ĉirkaŭaĵon. La tuta teritorio apartenas al la tn: „Hajta” Naturprotektata Distrikto. Antaŭtagmeze la tendarloĝantoj povos lerni dunivele la lingvon Esperanto. Bazgrade instruos sinjorino Tereza Kapista la serbia esperantista damo – por la progresantoj gvidos eo-lingvokurson sinjoro Stanislaw Mandrak, esperantista patrioto de Pollando. Estos ebleco por pasigi tie ankaŭ nur unu-du tagojn, aŭ nur dumtage partopreni la vivon de la tendaro.

La programo, aliĝilo kaj kromaj informoj troveblas ĉe la retejo <http://ijl.atw.hu>

Se vi intencas pasigi semajnon inter veraj esperantistaj cirkonstancoj, ne estas alia ebleco ol plenigi la rubrikojn de la aliĝilo, kaj sendi ĝin al mi. Speciale grava estas tiu ĉi por tiuj, kiuj volas lerni Esperanton nur por pli frue atingi la eblecon de lingvoekzameno el Esperanto. Ja, niveloj de la lingvoekzamenoj pravas la mempretigon individuan, al kio senkondiĉe bezonatas la ekzerteco de la lingvouzo.

Inter la ĝis nunaj anoncintoj estas gejunuloj ankaŭ el Rusio kaj la okcidentafrika demokratia lando: Ganao.

Organizanto:

s-ro Ferenc Harnyos

Tel: +36 /70/450-1686

/La hungarlingvan tekston de Ferenc Harnyos, esperantigis kaj kompletigis per la konoj pri
Jászberény: Adrienne sinjorino Pásztor/

Amika Renkonto de Fervojistaj Geesperantistoj – Pécs 2010

Ni aranĝas la 2-4-an de julio 2010 en urbo Péce la 42-an Landan Fervojistan Esperanto-Renkontiĝon. Pécs /Péc/ estas ĉi-jare kultura ĉefurbo de Eŭropo, pro tio dum la menciitaj tagoj ankaŭ multe da okazintaĵoj okazos. Pri tiuj ĉi vi povos informiĝi ankaŭ rete

www.pecs.2010.hu

Programo

2. julio, vendredo:

Ekskurso I. Veturo per trajno je la 13-a horo kaj 30 minutoj al Palkonya, kie ni vizitos jaman vinkelvicon de la setlejo. Tie estos vingustumado el konataj ruĝaj vinoj de regiono de Villány kaj tie ni vespermanĝos / senlima konsumo/. Reveturo al Pécs per la vespera trajno./ minima nombro de la anoncantoj estas 10 personoj./

Ekskurso II. Kiuj ne partoprenas la I-an ekskurson, por tiuj ni organizas lokan ekskurson per loka aŭtobuso al Tettye de Pécs, kie ni rigardos la kalkotofan drakogroton, arboreton de Pintér-ĝardeno, ruinojn de la iama derviŝo-lernejo. Belega panoramo estas al la urbo, kiu regalas la fotadon. Unu kaj duonhora ekskurso estos en la subtero de la urbo en kelojn kaj grotojn / estas bezonata la sporta vestaĵo./ La vespermanĝo estos proprakosta.

3. julio sabato

Urborigardado, I. Ĝi komenciĝas je la 9-a horo. Rigardoj de la subtera prakristana sep duoncirkla kapelo /cella septichora/ kaj tombokonstruaĵoj /post Kristo 4.jc./, ĉefpreĝejo de la miljara episkopeco, katedralo, katedralmuzeo. Tiel same en la suba preĝejo rigardo de tombomonumento de la antaŭ du jaroj denove tombigita episkopo, poeto, Janus Pannonius. Kaze de sufiĉnombraj interesantoj estos esperantlingva katolika diservo en tiu preĝejo, kiu funkcias loka de turka preĝejo de paŝao Ghazi Kaszim.

Tagmanĝo: 14.00 – 15.00

Libera konversacio: estos post la tagmanĝo pri aktualaj fervojistaj Esperanto-movadaj temoj. Ĝia atendebla tempodaŭro estos unu horo.

Kronado: Post la konversacio ni komune kronos memortabulon de D-ro Stefano Bácskaí en la parko-Esperanto.

Post la kronado estos ebleco laŭ deziro por rigardi la proksimajn muzeojn / Vasarely, Csontváry, Zsolnay / kaj estos speciala ebleco por rigardi la monumentan Kristo-trilogio de Mikelo Munkácsy.

Vespermanĝo: 19.00 – 20.00

Post vespermanĝo estos ebleco partopreni aranĝojn de la Eŭropa Kultura Ĉefurbo laŭ deziro.

4. julio, dimanĉe

Matenmanĝo: 7.30 – 8.30

Urborigardado II.

En Pécs kunvivis multe da naciaj minoritatoj. Tio ĉi pravas, ke la turka preĝejo de Jakovali Hasszán – kiu devenas el tempo de la turka okupado – nuntempe estas muzeo kaj ankaŭ preĝejo de la denove aperintaj konfesantoj de islama kredo. Dum la urborigardo ni rigardos tiun turkan preĝejon, poste promenas en la urbocentro apud banejo de paŝao Memi kaj apud

unu arkeologia loko kaj apud Palaco Poŝto. Ĉi tie videblas unu originala Zsolnay- konstruaĵo kaj konstruaĵkovraĵoj. / Poste sekvos rigardoj de la izraelida sinagogo, la rekonstruita ĉefplaco, la placo Széchenyi.

Tagmanĝo: 12.00 – 13.00

Post tagmanĝo estos libera programo. Ni proponas programojn de la Eŭropa Kultura Ĉefurbo.

Ceteraj informoj:

Dormejeblecoj:

La dormejoj estos rezervitaj en Gastodomo /Pécs, str.Damjanich 11/, aŭ en Kolegio de Teknika Fakto de „Janus Pannonius Scienuniversitato /Pécs, str. Boszorkány 22./ Inter ili estas la distanco 400 metroj. De la fervojstacio ili estas bone alproksimiĝebla. Parkejo estas por aŭtomobiloj en kortoj de la Gastodomo kaj la Kolegio. En ambaŭ du dormejoj eblas certigi lokon antaŭ renkonto kaj post ĝi, se iujn interesas, programoj de la Kultura Ĉefurbo.

Manĝadeblecoj:

La organizita manĝado estos en Kolegio de la menciita universitato, krome en Palkonya, kiuj partoprenas la unuan ekskurson.

La manĝadojn eblas mendi / sabato-dimanĉo: tagmanĝo; sabato:vespermanĝo; dimanĉo: matenmanĝo /

Gravas por scii:

La kostoj estis kalkulitaj laŭ nuntempaj prezoj pro tio eblas kostoŝanĝoj.

La kostoj ne inkluzivas trafikajn kostojn.

1 aprilo 2010. Pécs

La organizantoj



Ruinoj de Tettye –laŭ la hungara Vikipedio

Pliaj informoj

La Internacia Kalendaro de Aranĝaĵoj montras kaj hungare kaj ankaŭ esperantlingve la ekzercajn eblecojn de la lingvo Esperanto dum la ĉi lingvaj aranĝaĵoj de la mondo. Sed la retejo enhavas informojn pri ankoraŭ multaj interesaĵoj, tial mi rekomendas en vian karan atenton; la www.eventoj.hu retejon de la Kultura Esperanto-Asocio.

Adrienne sinjorino Pásztor

La jaro 2010a estas ankaŭ la Jaro de numero 3

Laŭ la hungara Libera Enciklopedio (Vikipedio) la numero 3-a simbolas la 3-an distribuitecon de la mondo. Tiuj ĉi estas: spirito-korpo-animo, naskiĝo-vivo-morto, pasinto-nuno-estonto. Ni en nia regiono ofte diradas, ke 3 estas la hungara vereco. Tiuj estas: kredo-espero-amo; laŭ la religia argumentado, laŭ la adopta pruvo de la sankta triunuo. La penso de la hungara unu-trio, estas fundamento de la hungara mondkoncepto. Tio montras, ke la hungaraj koloroj: ruĝa, blanka, verda kreas trion. La ruĝa estas la animo, koloro de la Suno, la blanka estas la spirito: koloro de la akvo kaj de la Luno, la verda estas koloro de la kreskaĵoj, la grundo, la Tero. La signifo de tiuj koloroj: ruĝa-blanka-verda estas: animo-spirito-kreskaĵo, faro-akvo-grundo, Suno-Luno-Tero! Laŭ percepto de kelkuloj, kiuj la numeron 3 iamaniere gardas en siaj naskodatoj, tiuj homoj disponas pri grandaj animforto, energio, agemo. Ilia viviga jarsezono estas la printempo. Laŭ la onikompreno tiuj homoj estas fieraj, ŝatas la sendependecon, oftas ĉe ili la arta inklino, la grandan travidkapablon bezonata saĝeco, kaj ili estas progreseme pensadantoj.

Adri sinjorono Pásztor

Nova Memortago en Hungario

La 11-an de aprilo la elekton de parlamentanoj je pli ol 2/3 gajnis la Burĝa Alianco de FIDESZ - KDMP (Junaj Demokratoj kaj Kristan-demokratia Partio). Unu el la unuaj decidoj de la nova parlamenta asembleo estis, ke *ĝi deklaris la tagon de la 4-a de junio*, preskaŭ unuvoĉe, **Tago de la Nacia Kunaparteno**.

Antaŭ 90 jaroj, la 4-an de junio 1920 iĝis subskribita la Packontrakto de Trianon, pere de kiu la Aliancitaj Potencoj distranĉis Hungarion. Hungario perdis 2/3 de sia teritorio, kaj 3,5 milionoj da hungaroj fariĝis minoritataj civitanoj de fremdaj landoj. Ĉiu najbara ŝtato ricevis pecon. Tiuj estis: la tiam kreita Ĉeĥoslovakio, Romanio, la Serba-Kroata-Slovena Regno, kaj la Aŭstria Respubliko. Laŭ la leĝo estiginta la Memortagon ĉiu hungara homo apartenas al la hungara nacio. Kaj la leĝo ekskludas ĉiun perfortan, kun la internacia juro ne konforman agon.

d-ro Endre Dudich

Elstara figuro de nia altetaksata pasinto estas Ferenc Kölcsey/ 1790-1838/



/Laŭ la Hungara Vikipedio/

Pri nomo de Francisko Kölcsey, ni memoras Himnon. Li estis poeto de teksto de nia nacia himno. Li estis ido de mezgrandbiena nobla familio. Kiuj konis lin pli bone, ankaŭ laŭ tiuj li estis la plej progresema poeto de la hungara literaturo en epoko de la hungara romantismo post Martinovich kaj Petőfi. Lia rolo apartenis al la politikhistorio kaj literaturhistorio de sia

epoko. Li estis unu el la preparantoj de la sistema hungara literatura kritiko. , Do, li apartenis al ĉefrolantoj de la hungara literaturo.

La grandskalan, gravan vivoverkon heredigis por la posteularo iu malsana, malfortan korpon havanta, sed virece fortan animon havanta homo.

Karakteron formantaj okazintaĵoj de lia vivo:

-en infanaĝo li kuŝis malsane hejme pro variolo, dume la el brulanta forno eksaltanta fajrero blindigis lian iun okulon. Li iĝis pro tio timema, retiriĝema.

-li estis ses jaraĝa, kiam perdis sian patron kaj dekunu jara estis, kiam perdis sian patrinon. Li iĝis pro tiuj malgaja, melankolia individueco.

Li legis multĉion, parolis plurlingve, pro tio havis gtravan antikvan klerecon.

Li estis adepto de la severaj republikanaj principoj. / romia moralo./

Li taksis Franciskon Kazinczy kiel sia Majstro, preskaŭ sia patro. Junaĝe li priinsistis al la klasikisma normo.

Li studis en Debrecen en la Reformata Kolegio latine, greke, germane kaj france. En Peŝto li studis jurajn studadojn, sed poste ne faris ekzamenon.

Lia loko en nia literaturo

-Poeto de la hungara himno.

-Gvidanta lirikisto de la reformepoko./Vanitatum vanitas, Versoj de Zrinyi, Hust./

-Kreanto de la hungara disertanta prozo./ Naciaj tradicio, Mohács./

-Fama nacion edukanto /Parainesis al Kolomano Kölcsey./

-Unu el la plej famaj reprezentantoj de la hungara principa kritiko apud Jozefo Bajza./Recenzo de Csokonai kaj Berzsenyi izolis lin de multaj literaturiistoj, plue kreskante sian solecon. /

-Li estis ekzemplomontra publikhomo. Lin karakterizis unueco de la vorto kaj faro.

Liaj pensoj estis: Popolismo- demando de rilato de la popol,-kaj arta poezio; modelon sekvanta poezia evoluopriskribo de la grekuloj kaj aliaj popoloj de Eŭropo./ „Havu veran amon pri lingvo de la patrujo....”

-Ni devas alproprigi la patrolingvon, ke ni povas paroli bele kaj klare. Devas ami kaj evoluigi la lingvon de la patrujo.

-Patrujo, nacio kaj lingvo estas interrilataj nocioj.

-Li instigis por lerni lingvojn./greka, latina./

-Ekzemplo de la akvoguto kaj la maro./ ĉiu estas organika ero de la tuto./

-La individuo servas la komunumon. /reformepoka formacio./

Himno / 1823 /

Li verkis ĝin la 22-an de januaro 1823. Ĝi aperis presite unue en 1828 en eldonejo Aŭroro. Ĝin muzikigis Francisko Erkel. Ĝi estiĝis dum kriza epoko, tempe de absolutismo de reĝo Ferenc, la 1-a. Tiutempe ne estis perspektivoj kaj senespereco regis.

Ĝia ĝenro estas unu tipo de la odo: al supernatura estaĵo, al Dio, , aŭ al abstrakta nocio eksonanta versaĵo.

Ĝia ĉeftitolo estas ĝenron signanta titolo. Ĝia subtitolo estas „El ŝtorma jarcento de la hungara popolo.” Laŭ la subtitolo la poeto ekparolas doloremvoĉe de la bardoj de la 16. jarcento. Kaŭzo de la doloremvoĉo estas la cenzuro kaj la sama historia sorto.

Hust / 1831 /

Ĝi estas epigramo. Li verkis laŭ la klasicismaj principoj laŭ distikono.

Ĝia strukturo estas:

1. Romantikaj bildaj akcesoraĵoj: ruino, nokto, fantoma silento, kiel vizio „ŝvebanta fantomfiguro” / tiuj estas ŝatataj atmosferon kreantaj iloj./

2. Fina saĝo – ekde tio la frazo iĝis sentenco „Agu, riĉigu, kreu, prosperos via patruj!”

Hust

Ĉe la ruinoj tristaj de Husta kastelo mi haltis,
estis silento, desub / nubo aperis la lun'.
Jen ekblovas la vent' kiel spiro eltomba, kaj inter
halaj kolonoj jen / mansignis al mi fantom'.
Kaj diris: Patriot', meditadi sur la ruinoj,
serĉi la estinton, / kion validas nun?
Foran futuron komparu atente kun la nuntempo,
Agu, riĉigu, kreu -/- prosperos via patruj!'.

/ 29 decembro 1831 Cseke/

(La poemon: Huszt verkita de Ferenc Kőlcsey, esperantigis: d-ro Endre Dudich)

La publika aganto

-Same al Paŭlo Szemere, ankaŭ la publika rolado ĉesigas la solecon por kelka tempo.

-Li iĝis departementa oficisto en 1829. /subnotario de departemento Szatmár, pli malfrue ĝia notario./

-1832. Li iĝis ĉefnotario de departemento Szatmár.

1832-1835. Li iĝis parlamenta deputito de departemento Szatmár. /Parlamentata taglibro, Pri temo de dumviva elaĉeto, Pri stato de imposton paganta popolo de departemento Szatmár.

-1835. Li ne interkonsentis pri siaj senditaj taskoj, pro tio la eksterordinare lojala Kőlcsey rezignis sian oficon. / Adiaŭo de la landaj ordenoj./

-1836. Post la ĉesiĝo de la Parlamento li entreprenis defendon de la ekprocesita Wesselényi.

-Sian kuzon li edukis. /Parainesis al Kolomano Kőlcsey./

-1838. Li malvarmumis kaj baldaŭe mortis.

- Lia tombomonumento staras inter la famaj „boataj” memorfostoj de Szatmárcseke.

/La hungarlingvan tekston de s-ino Adri Pásztor esperantigis: László Pásztor/





NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.uw.hu>
<http://radoocool.tisser.hu>